

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

# Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՆԵՅԵԿ  
ՅԵՐԱՅԵՆԻՔՈՒՄ

**Ĉi-numere legu pri:**  
**KELKAJ BRILAJ MOMENTOJ DE UZE**  
**PELAZGOJ - LA PRAPOPOLO**  
**CENTJARA JUBILEO DE LA KROATIA**  
**AERONAŬTIKO**  
**NOVJARA FESTO EN BANGLADEŜO**  
**DEC FONDITA POST MULTAJ KLOPODOJ**  
**UNESKO KAJ KROATAJ HUMANISTOJ**

1

2010

## Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

## Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

## Plenumredaktoro:

Josip Pleadin  
B. Jelačića 138 A  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
josip.pleadin@gmail.com

## Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr  
zagreba.esperantisto@gmail.com

## Redakcianoj:

Snježana Habulin, Vida Jerman,  
Jozo Marević, Radenko  
Milošević, Velimir Piškorec,  
Josip Pleadin, Mato Špekuljak

## Presis:

Grafokom, Đurđevac

## Aperritmo:

Neregula

## Konto de UZE:

2340009-1110321529  
(Privredna banka, Zagreb)

## UEA-kodo:

uzes-y

## RESUMO

Karaj niaj legantoj, vi certe ne atendis, ke "Zagreba Esperantisto" denove aperos. Pasis jam sufiĉe da tempo post ĝia eksilento, sed jen agrabla surprizo por vi! En la komenco ni volus klarigi al vi la kialojn pro kiuj estis ĉesigita la aperritmo de nia revuo, ĉar ni opinias, ke tio estas nia ŝuldo al vi. Ni volis ankaŭ skizi kelkajn brilajn momentojn el la laboro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kiu efektive posedas la gazeton. Grandan parton de la aktuala numero konsistigas diverslandaj artikoloj, kiuj estis planitaj por aperigo en niaj antaŭaj numeroj. Pri la malnova pelazga popolo verkis nia albana kunlaboranto, pri la kroata aeronautiko la ĉefa redaktoro, pri la novjara festo en Bangladeŝo la denaska bangladeŝano. Inter tiuj artikoloj, konforme al sia redakta politiko, troviĝas ankaŭ du artikoloj kiuj konigas kroatojn kaj Kroation al vi. La unua rilatas la internacian agnoskon de la kroata lingvo kaj la dua la jaron 2010, kiun Unesko dediĉis al kroataj humanistoj.

En aro da portretoj, ni elektis la homojn kiuj tion nepre meritas: la multtalentan UZE-anon Nikola Turk, kiun ni konas kiel grandan filateliston kaj aŭtoron de la unua Esperanto-ekspozicio de filatelaĵoj en Kroatio. Pri Franjo Vokoun ni rememoras okaze de la 25-jariĝo de lia forpaso kaj Smail Grbo prezentas al ni la propran hejmmuzeon pri Esperanto.

Raportante pri diversaj Esperantaj aranĝoj, ni ne povas forgesi la 8-an kongreson de kroataj esperantistoj en Velika Gorica kaj la sukcesan Esperanto-kurson gviditan en Križevci de Krano Puškar.

Malgrandan recenzeton, verkitan de gimnazia kursanino el Đurđevac, ni dediĉas al "La vivo de Damoru", la verko el la Eŭropa projekto de Kroata Esperanto-Ligo. Aparte ni elstarigas la oficialan fondon de DEC en Đurđevac la 13-an de junio ĉi-jare, kaj ĝian unuan kontakton kun la Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio.

Vida Jerman kaj Spomenka Ŝtimec ricevis en Havano, dum la UK, diplomojn por elstara kultura agado, kaj nia plenumredaktoro Josip Pleadin gajnis la duan kaj la trian premiojn en la Belartaj Konkursoj por originala poezio. Ni do mencias ankaŭ la internacie sukcesan kroatan triopon.

Kvankam literaturo ĉi-numere ne estas sufiĉe reprezentita, ni instigas vin legi la originalan rakonton "Homa fiero" de nia pola kunlaborantino. Per "ĝis revido", ni deziras baldaŭ prezenti al vi novan numeron.

**La redakcio**

# LA LASTA NE ESTAS LA LASTA

**Karaj samideanoj, legantoj kaj abonantoj de "Zagreba Esperantisto",**

Ofte en la vivo aperas neplanitaj problemoj, kaj ni devas alfronti ilin kun plena kuraĝo kaj espero pri bona kaj rapida solvo. Kiam antaŭ pli ol tri jaroj startis nia revuo "Zagreba Esperantisto", ni estis okupitaj per entuziasmo kaj daŭre "plugi nian sulkon". Ofte al niaj legantoj ne estis klare, ke nia gazeto, jure posedata de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), malfacile funkcius sen riĉa kaj daŭra monsubteno de individuoj kaj organizaĵoj, ĉar estis multaj legantoj, sed nesufiĉe da abonantoj por kovri la kostojn. Komence de la jaro 2009, kvankam ni povis antaŭvidi malfacilaĵojn, ni ne volis cedi, kredante, ke la malfacila momento estas nur pasanta periodo en nia funkciado. La vivo negis al ni la rajton pri tia optimismo. Post multaj klopodoj pri nia revuo, vi ja certe rimarkis, kaj viaj leteroj kaj mesaĝoj al ni tion konfirmas, ke "Zagreba Esperantisto" praktike ĉesis aperi sub cirkonstancoj al vi ne tute klaraj. Nia estraro provis rebonigi la aferon, ĉar ja preskaŭ tri numeroj estis prespretaj, sed mankis mono por realigi la presadon.

Al vi kiuj pagis la abonon por 2009, UZE ŝuldas kvin numerojn, kies presado ne okazis, ĉar ĉiuj provoj trovi la necesan monon fiaskis, kaj same tiel ankaŭ la promesitaj monsubtenoj el kelkaj fontoj ne realiĝis. Por la ŝuldataj numeroj necesis kolekti ĉirkaŭ 30.000 kunaĵoj (4.000 eŭroj), kio en la momento de akriĝinta ekonomia krizo enlande (kaj mondscale), praktike ne eblis.

La Estraro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj devas informi vin pri la vera stato. Ni devos ĉesigi la iman regulan aperitmon, kaj provi (sed nur tion ni povas promesi al vi: provi!) plenumi la mision: iom post iom presi kaj sendi al vi la ŝuldatajn numerojn.

Viaj multaj kaj oftaj reagoj pri la tekstoj

aperintaj en "Zagreba Esperantisto" konfirmas, ke vi ŝatis legi ĝin, kaj multaj esprimis sian tre sinceran bedaŭron pro ĝia malapero. Pro tiaj reagoj, pro tiaj opinioj kaj pro vi - la legantoj - ni ne povas ĉesi, kvankam la ĉeson ordonos la pura realismo. Kiel ajn aspektas nun la situacio kaj rilatoj inter la legantoj kaj UZE, konsideru la faktojn kiuj venigis

nin al sakstrato. Reveni ne eblas, kaj transalti la muregon antaŭ ni estas malfacile. Eble iu ŝatus proponi al ni ŝtupetaron, subteni nin en niaj pluaj laboroj? Tamen, ni konscias, ke jam ĉiuj el ni estas lacaj pro financado de diversaj projektoj, pro la magraj rezultoj kiujn nia financa helpo ebligas kaj nin mem elĉerpas. Multaj el ni opinias, ke iom post iom pasas la tempo de presitaj gazetoj. Eble estas tiel. Sed viaj multaj leteroj al ni asertas ion tute alian. Ni ankaŭ plenkore kredas, ke nur la presita gazeto havas la sencon, nur ĝi havas sian longan daŭron, kaj nur ĝi povos plene atesti pri niaj klopodoj por Esperanto. En la momento kiam en interreto ĉiu povas publikigi kion ajn, sen kritika observo, jam nun

montriĝas spuroj de malkonkordo, neraciaj agoj kaj aktivecoj, kiuj nur kompromitas Esperanton en la okuloj de ni mem, sed - ankoraŭ pli danĝere - en la okuloj de tiuj kiuj devus kredi pri la rolo de Esperanto por paca internacia kunlaboro, ni devas elekti la vojon. Ĉu ni mem daŭre konstruos Esperantujon, aŭ ni lasos ke la krizaj periodoj en nia vivo montru al ni pli facilan, sed ankaŭ malpli certan evoluon?

Se vi volas kredi pri tio kion kredis Zamenhof, vi certe komprenos ankaŭ niajn nunajn embarasojn.

Sincere kaj amike,

La redakcio



# KELKAJ BRILAJ MOMENTOJ DE UNUIĜO DE ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

*Redakcia kompilo*

“Ne gravas kiom foje oni falas - gravas kiom foje oni leviĝas”. Tiel diras la proverbo, kaj ne malprave. Ĉiam en la homa vivo okazas sukcesoj kaj malsukcesoj, faloj kaj leviĝoj, kreskoj kaj malkreskoj ... Multfoje temas pri individuaj eraroj, sed ofte ankaŭ pri neantaŭvideblaj cirkonstancoj.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) startis kun multe da entuziasmo kaj malgraŭ malfavoraj situacioj, la UZE-anoj volis progresigi Esperanton en Kroatio, ili volis doni novan freŝecon al la esperantista agado. Sur tiu vojo kuŝis multaj obstakloj, kiuj fine de 2009 rezultis per kulmino de krizo en UZE, kiu sentebliis jam duonjaron pli frue. La internan krizon de UZE ankoraŭ pli draste influis la intertempe okazinta ekonomia krizo, kiu baris al UZE ĉiun aliron al sponsoroj kaj monsubtenantoj.

Ŝajnis do ke UZE ja ĉesos ekzisti kiel multaj aliaj organizaĵoj, sed antaŭ ol tio okazos, ni provu nombri kelkajn brilajn momentojn el la ĝisnuna mallonga historio de tiu organizaĵo. Ĉefe ni menciuj tion, kio okazadis post la apero de la unua kaj la lasta pasintjara (februara) numero de nia gazeto, kiu efektive aperis kaj estis distribuita fine de majo 2009. Ĉi tiu provizora “raporto” inkluzivas do la eventojn kiuj finiĝis per okazigo de la lasta jarkunveno, la 26-an de februaro 2010. Post la jarkunveno ekregis pli ol duonjara senlabora vakuo, kiu finiĝas per ĉi tiu numero de nia gazeto. Se ni jam ne povas ŝanĝi la aferojn, almenaŭ ni honeste diru al ĉiuj kiuj subtenis nin, kio bona restis malantaŭ ni, kaj kiajn esperojn ni havu en estonteco.

La lasta numero de “Zagreba Esperantisto”, la numero 1(11) anoncis, ke UZE-anoj organizite vizitos la lokan “Kokofeston” en Đurđevac.



La planita vizito al Đurđevac okazis la 26-an de julio 2009. Dekkvinopo da UZE-anoj kaj aliaj esperantistoj en Đurđevac diskutis pri realigo de la programo de UZE, kun la ĉefa akcento je kelkaj gravaj temoj: Dokumenta Esperanto-Centro, la lernolibro de Stano Marček en la kroata kaj TEJA-agado. Rezulte de tiu kunsido (ĝi estas konsiderata kiel Estrarkunsido de UZE), denove ekfunkciis la portalo de “Zagreba Esperantisto”, ĉar estis trovitaj sponsoroj kiuj dum unu jaro financos la portalon. Prezentita estis ankaŭ la presprovaĵo de la nova lernolibro, kiun al la kroata tradukis nia membrino Marija Jerković.



Inter la 10-a kaj la 26-a de aŭgusto 2009, UZE organizis la tre sukcesan vojaĝon de Elena Ŝaravina kaj Katja Ĵirnova el Krasnojarsko (Rusio) tra Kroatio. La 11-an de aŭgusto ili prelegis al esperantistoj en Kroatia Ekonomia Ĉambro en Zagrebo pri “Via unua renkontiĝo kun Siberio”, kaj la sekvan tagon turisme vizitis la urbon gvidataj de sperta ĉiĉerono Neven Kovačić. La 13-an ili vizitis Đurđevac, kaj la 14-an tuttage ekskursis al la regiono de Zagorje, vizitinte plurajn lokojn: Stubica (konatan pro la granda kamparana ribelo en 1573), la historian tilion de Matija Gubec (gvidanto de la ribelintoj), Kumrovec (la naskiĝdomo de Josip Broz Tito kaj Etnografian vilagon), kaj fine la termalbanejon Tuheljske toplice. La 14-an ili ripozis en Đurđevac, kaj la 15-an UZE-anoj veturigis ilin al la adriatika marbordo. En la havenurbo Rijeka ili estis gastoj de la loka Esperanto-societo kaj en sia domo gastigis ilin Vjekoslav Morankić. La 17-an de aŭgusto ili prelegis en la rijeka societejo.



La 19-an ili forveturis al Split, por gasti kaj prelegi (la 21-an) en Esperanto-societo Split. La 23-an ili alvojaĝis al Osijek. En la vilaĝo Poganovci estis preparita, kunlabore kun "Orbis Pictus" de Višnja Branković, iom nekutima programo "La mondo en mia korto", celanta reklami Esperanton inter la vilaĝanoj. Ilia vojaĝo finiĝis la 26-an de aŭgusto kiam la reprezentantoj de UZE Radenko Milošević (la prezidanto) kaj Mato Špekulljak adiaŭis de ili en la zagreba flughaveno. La kunordiganto de la tuta vojaĝo estis Josip Pleadin, la vicprezidanto de UZE. Pri la gastinoj estis farita televida raporto en Split kaj aperis pluraj gazetartikoloj.



La 28-an de septembro 2009 grupo de 29 geesperantistoj el Bjalistoko vizitis Kroation gviditaj de Ela Karczewska kaj Nina Pietuchowska. La vicprezidanto de UZE kontaktigis la grupon kun Esperanto-societo Rijeka, kiu pere de Vjekoslav Morankić trovis por ili loĝejon en sia urbo. La grupo parte ĝuis la banadon en ankoraŭ varma Adriatika maro, kaj parte ekskursis, interalie al Opatija (kie ĉiĉeronis por ili Boris Di Costanzo) kaj al la insulo Krk. Revenante al Pollando, la grupo, helpe de UZE, tranoktis inter la 27-a kaj 28-a en la Hostelo "Remetinec" en Zagrebo, kaj la 28-an de septembro ili renkontiĝis kun la reprezentantoj de UZE, kiuj helpis al ili konatiĝi kun la vidindaĵoj de Zagrebo. UZE-anoj preparis por la polaj gastoj ankaŭ siajn eldonadojn, kaj donacis al la bjalistoka Zamenhofa centro kelkajn librojn en Esperanto.

La 17-an de oktobro 2009 pluraj UZE-anoj partoprenis la jaran renkontiĝon de kroataj esperantistoj en Osijek, kie ili unuafoje prezentis la presitan lernolibron de Stano Marček en la kroata lingvo. Samloke ili disdonis la veteranajn diplomojn al kroataj esperantistoj kun pli ol 50-jara laboro en la Esperanto-movado. La diplomojn UZE atribuis al: Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Vukašin Dimitrijević, Zora Heide, Aleksandar Kocian, Milivoj Lozovina, Dinko Matković, Nada Med, Ivo Puharić, Milan Sudec, Josip Vrančić, kaj postmorte al Dalibor



Brozović, Nives Car-Privilegi, Roger Imbert kaj Franjo Šlabek



La 23-an de oktobro 2009, en Ekonomia Ĉambro en Zagrebo, okazis solenaĵo, dum kiu estis oficiale publike prezentita la lernolibro de Stano Marček "Esperanto - izravna metoda", kiun eldonis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj. La solenaĵon per sia partopreno honorigis la aŭtoro mem, s-ro Stano Marček, kaj lia filino Linda, kiu ilustris la lernolibron. Antaŭ sepdeko da esperantistoj s-ro Marček prezentis sian metodon de instruado, la lernolibron en la kroata, kiu eldoniĝis jam en 23 lingvoj, kaj aliajn helpilojn por instruistoj. Estis organizita malgranda ekspozicio de diverslingvaj eldonoj de la lernolibro kaj ekspozicieto de Esperantaj lernolibroj eldonitaj ekde la jaro 1909 en Kroatio. En la solenaĵo parolis la tradukistino Marija Jerković kaj la estraranoj de UZE Radenko Milošević kaj Josip Pleadin. Post la solenaĵo la aŭtoro mem subskribis la aĉetitajn lernolibrojn, kaj sekvis koktelo.



La 14-an de februaro 2010 en Utrine (parto de Zagrebo situata sude de la rivero Sava), organizita de CB Radio Net Klubo "Croaticum" kunlabore kun Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), okazis prelego "Esperanto: hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ". La prelego estis enkonduko al posta kurso de la internacia lingvo. Enkonduke pri la temo prelegis Radenko Milošević, prezidanto de UZE. Marija Jerković, prezidantino de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto en Kroatio, donis kelkajn instruajn klarigojn pri estonta kurso kaj prezentis al la ĉeestintoj, kiuj montris intereson por leni Esperanton, la lernolibron de Stano Marček laŭ kiu estos gvidata la kurso. La kurso daŭris ĝis la mezo de junio kaj estis tre sukcesa. Konfirmas tion ankaŭ la deziro de la partoprenintoj daŭrigi la lernadon ankaŭ dum la ĉi-jara aŭtuno kaj vintro.

La 26-an de februaro 2010 en Ekonomia ĉambro en Zagrebo okazis Jarkunveno de UZE, kiu resumis la jaron 2009. Bedaŭrinde, tiam estis konstatitaj multaj nesolveblaj problemoj, kaj post la jarkunveno la aktivecoj de UZE rimarkeble

malintensiĝis. La krizo daŭris ĉirkaŭ ok monatojn, kaj estis kaŭzita ĉefe per manko de necesaj financaj rimedoj.

Krom la menciitaj programoj, okazis ankaŭ kvar kunsidoj de la Estraro de UZE: du en Zagrebo kaj po unu en Vrbovec kaj Đurđevac.



## FRONTPAĜE

*Davor Grgat*

Nia frontpaĝa foto montras la 40-jaraĝajn francajn geedzojn Cyrille Pinardon kaj Rose Sanz, poŝtoficistojn, kiuj la 16-an de marto 2009 ekveturis el Parizo al la vojaĝo de sia vivo. Ili intencas vojaĝi tra la mondo per bicikloj. Tra Kroatio ili pasis jam en aprilo 2009, kaj se vi volas sekvi ilian vojaĝon, vizitu <http://horizonto.free.fr/>

La du nekutimaj vojaĝantoj estas membroj de la franca landa Esperanto-asocio, kaj per uzado de "Pasporta Servo" kaj kontaktoj kun lokaj esperantistoj ilia vojaĝo fariĝas multe pli facila. La kaŭzo de ilia vojaĝo estas simpla deziro eskapi el la streĉa vivo kaj fari paŭzon, konatiĝi kun novaj homoj kaj landoj.



# CENTJARA JUBILEO DE LA KROATIA AERONAŬTIKO

Dimanĉe, la 29-an de aŭgusto ĉi-jare, Kroatio solenis en Zagrebo la centjariĝon de kroatia aeronaŭtiko. La jubileo omaĝis la konstruadon de aviadilo de Slavoljub Penkala kaj la unuan flugon per ĝi de Dragutin Novak en la jaro 1910. La aviadilo de Penkala estis la unua post tiu, kunkonstruita de la fratoj Wright en Usono.

La belega, sunoplena dimanĉo kaj la ĉeesto de 30 mil spektantoj, multaj pilotoj, stirantoj de senmotoraj glisiloj, paraŝutistoj kaj multaj membroj de Zagreba aeroklubo kaj Zagreba aeronaŭtika unuiĝo, kiuj iniciatis la solenaĵon per la repliko de la aviadilo de Penkala aviadilo, postlasis la bonegan impreson.

Por reconstruo de la aviadilo estis engaĝita inĝ. Anton Cvjetković, konata veterano en aviadilkonstruado kaj spertulo en la usona projekto Apollo de NASA kaj la ĉefa prilaborinto de la aviadilaj partoj estis Marijan Ivanček. La repliko havas iomete plibonigitajn performancojn kun la 9 metrojn longaj flugiloj kaj kun la motoro da 80 ĉevalpovoj.

Bedaŭrinde, la organizantoj de la solenaĵo, la kolektiĝinta publiko kaj potenciala piloto kaj la engaĝitaj fakuloj pri reconstruo, estis senrevigitaj, ĉar la Stata agentejo pri civila aernavigado malpermesis ekflugon de la flugilo "CA 10 Penkala". Oni flustris, ke temas pri persona ĵaluzo, ĉar la provflugo okazinta tagon pli frue, efektiviĝis sen permeso de la Agentejo.

Ĉi-momente nepre menciendas du bravaj viroj, kiuj laŭ siaj eblecoj patoprenis en la projekto de la aviadilo de Penkala. La unua estis la konstruisto Slavoljub Penkala mem kaj la dua la diplomita piloto Dragutin Novak, kiu la unua en Kroatio flugis per tiu ĉi aviadilo.

**Eduard Slavko Penkala**, naskiĝis en tiutempa Hungario, sed nuntempa Slovakio, en 1871. Lia patro Franjo estis polo almigrinta en 1904 al Zagrebo, la urbo en la tiama Aŭstri-hungara Monarkio. Eduard Penkala tiel ekamis la novan patrolandon kaj la urbon Zagrebo, ke li decidis subskribadi sin per la nomo – Slavoljub. Slavoljub Penkala, kemia inĝeniero, estas konata al vasta publiko plejparte pro la invento de speciala skribilo - mekanika krajono, pli poste nomata nur – penkalo. Li inventis ankoraŭ pli ol 80 registritajn patentojn: fontoplumo, termoforo, termobotelo, aerkuseno, diversaj mezuriloj kaj multaj aliaj inventoj. Esplorinte aerfluron Penkala eksciis pri nova forto-origino – aersuprenpuŝo (aerzomo), kio puŝis lin al konstruado de flugmaŝino. Lia amatora laborejo de



*La repliko de la aviadilo de Penkala prezentita dum la solenaĵo en Zagrebo*

aviadiloj troviĝis ne tro malproksime al la redaktejo de nia "Kroata esperantisto", sur Placo de la reĝo Tomislav 17 (tiam ĝi nomiĝis Placo de Francisko Jozefo!) en Zagrebo. Lia tuta vivo estis dediĉita al evoluo de diversaj industriaj sektoroj en Kroatio kaj Zagrebo. Subite, estinte nur 51-jara, mortis en la jaro 1922 tiu granda viziulo, majstro kaj grandulo de kreiveco.

La zagrebano **Dragutin Karlo Novak**, estis la unua kroata piloto kiu ekflugis la 22/23-an de junio 1910 per la aviadilo kiun konstruis Slavoljub Penkala el la militekzercejo en Crnomerec. Poste la aviadilo difektiĝis kaj Penkala rezignis pri pluaj esploroj. Tamen la flugo de Novak estis notita kiel la unua flugo per movmotoro en Kroatio. La kunlaboro de Novak kun Penkala, komenciĝis kiam Novak, laŭfakte mekanikisto, post iuj aliaj laboroj, dungiĝis ĉe Penkala kaj fariĝis lia dekstra mano ĝis la aviadilo difektiĝo. Kun aliaj dungitoj li laboris kaj kunkonstruadis aviadilojn. Post la militservo en militfortoj de Aŭstri-hungara Monarkio, kie li estis simpla soldato, li transiris al la monarkia aerarmeo kaj tie li ricevis la oran medalon por kuraĝo kaj multajn aliajn ordenojn. Post la unua mondmilito li rifuzis resti en la Aŭstria armeo kaj neniam plu li flugis eĉ ne kiel pasaĝero. Post la jaro 1918 oni intence dum sesdeko da jaroj prisilentadis lian kontribuon al la historio de la kroata kaj sudslava aeronaŭtiko. Post la jaro 1945 la nova politika reĝimo forprenis lian aŭtomobilaron kaj ĝis la emeritiĝo en 1954 li laboris en Križevci. En la jaro 1970 li revenis kun la familio al sia naskiĝurbo Zagrebo, kie li mortis 86-jara en 1978.

# PELAZGOJ - LA PRAPOPOLO

*Bardhyl Selimi*

La franca aŭtoro Robert d'Angely, en sia libro "La Enigmo", (Parizo 1991), tradukita jam ankaŭ albanen, skribis, ke "en prahistoriaj tempoj, antaŭ ol la poetoj kiel Homero kantis pri siaj Dioj kaj herooj de fabeloj, antaŭ ol skribiĝis la greka lingvo mem, vivis la popolo nomita *Pelazga*". Pelazgoj postlasis grandajn spurojn en la greka kulturo. Mi memorigu ĉi tie pri la Ciklopecaj muregoj de Panteono en Ateno.

El tiu forta prahistoria raso restis nur albanoj. Nur en pli malfruaj tempoj oni divenis, ke pelazgoj estis ja malnovaj iliroj, la unua branĉo hindo-eŭropeca, kies imperio etendiĝis de Malgranda Azio ĝis Adriatika Maro kaj norden ĝis Danubo. Tiuj ĉi iliroj migris ankaŭ en Italion kiel *toskoj* (Toscs) kaj vivas ankoraŭ en Albanio. En Italio ili vivas kiel Toscs, Tuscans, Etruscan.

Estas vane serĉi pri Dioj de Grekio en la etimologio de ties lingvo; en la albana tiuj estas tre klaraj kaj iliaj signifoj tre ĝustaj.

Multaj faktoj pravas, ke albanoj hodiaŭ ekzistas sur la tero de antaŭuloj kaj parolas la lingvon de siaj praavoj, eĉ el la tempo antaŭ ol la helena branĉo estus konata en la montoj de Tesalio. Shkodra estis la ĉefurbo de la majesta reĝlando de Ilirio; la albana estis la denaska lingvo de Aleksandro la Granda, konkerinta la mondon kaj de Piro el Epiro, unu el la plej grandaj generaloj menciitaj en la historio."

Post la konkerado de Ilirio fare de romianoj, komenciĝis malfacila vivperiodo por iliroj. Romianoj faris ĉion por ke iliroj ne plu restu unuiĝintaj. Ili disdividis Ilirion en multajn provincojn el kiuj la ĉefaj estis Iliriko (de Mat ĝis Danubo) kaj Suda Ilirio (Prevalitana kun la centro en la urbo de Shkodra, Dardanio kun la centro en Shkup, Nova Epiro kun la centro en Durrës,) Malnova Epiro (kun la centro en la urbo Nikopoj). Al la loka loĝanaro estis malpermesite uzadi la marŝiparon aŭ konstrui ŝipojn. Al neniu estis permesite komerci kaj geedziĝi ekster ties regiono. Ankaŭ la popolaj kunvenoj povis okazi nur ene de la respektiva regiono. La premo kaj ekspluatado kreskis kaj multaj loĝantoj sklaviĝis. Tio incitis la popolajn ribelojn. La plej potenca ribelo eksplodis en la jaro 6 kaj daŭris tri jarojn. La ribelintoj formis armeon el 200.000 piedirantoj kaj 9.000 ĉevalrajdistoj. Gvidis la ribelon Bato de Desidiatoj kaj Pini kaj Bato de Breŭkoj.

En la 3-a kaj 4-a jarcentoj la Romian Imperion trafis profunda socia, ekonomia kaj politika krizo sekvata de ties dividiĝo en la jaro 395. En tiu periodo ni vidas ĉekape de la Imperio plurajn ilirajn imperiestrojn (menciendas Klaŭdio la Dua, Aŭreliano, Deci, Diokleciano, Konstantino la Granda, Justiniano k.a.) kaj iliroj akiris la rajton de civitaneco. Post tio ili komencis ludi grandan rolon en la ekonomio, administrado kaj armeo.



## Enigmo de epitafoj kaj la albana

La albana lingvo havis ekde la pratempo ĝis nuntempo grandan gravecon kaj mirindan, nekompareblan literaturan evoluon. Pri ĝia deveno oni hipotezis jam delonge, almenaŭ ĝis la 19-a jarcento, ke ekzistas intima rilato inter la albana kaj la pelazga, la unua biblia lingvo de la homaro, lingvo de la olimpiaj dioj kaj helenaj klasikuloj.

La saman opinion havis ankaŭ la albanaj grandaj renesanculoj (el la 19-a jarcento) kiuj, traserĉinte la spurojn de nia popolo, ekvolis ĉerpi argumentojn favore al la renaskiĝo de la nacia konscienco de la albana popolo dum du mil jaroj subpremita. Sed ankaŭ fremdaj esploristoj, samkiel la albandevenaj studentoj el la albana diasporo, sin okupis vaste pri tiu hipotezo.

Unu el tiuj estas Robert d'Angely (1893-1966), la franca lingvisto kaj etnologo. Kvin el liaj verkoj plej valoraj estas jam resumitaj en la albana lingvo ekde la jaro 1998 sub la titolo "Enigma" (Enigmo). Interalie, en tiu libro oni klopodas deĉifri kelkajn el la pratempaj epitafoj trovitaj en diversaj





lokoj de Eŭropo, precipe en la mediteranea areo, apartenintajn al la pratempaj lingvoj, kiuj estis ja dialektoj de la supre menciita pelazga. Vanaj estis la longtempaj klopodoj de multaj sciencistoj por decifri tiujn epitafojn helpe de la ekzistantaj eŭropecaj lingvoj. Sed mirakle, Robert d'Angely sukcesis fari tion helpe de la albana, kio konfirmas ne nur la praecon de la albana mem, sed ankaŭ la supre menciitan hipotezon.

La aŭtoro eĉ konsideras tion kiel konfirmiĝon de la identeco de pelazgaj, tirenaj aŭ etruskaj, hititaj aŭ heteokretaj, frigiaj, likiaj, kariaj kaj la lingvoj similaj al la nuntempa albana, kaj la kvaliton de la albana kiel devenlingvo de la sanskrita, malnova greka kaj la latina. La pelazga, diras Robert d'Angely, dank' al sia pratempa deveno perdita en la mallumo de la antaŭhistoriaj tempoj, samaĝaj al tiu de la homo mem, kiel primitiva lingvo, donis sian kontribuon por la formiĝo de aliaj lingvoj, konsiderataj duagradaj aŭ mezopotamiaj, plej ofte nomataj semidaj. Ja ne povis esti alie, diras Robert d'Angely, ĉar heteokretoj estis ja parolintaj la saman lingvon pelazgan kiel ankaŭ la pelazgoj tirenaj kaj tirenanoj de Lemnos, etruskoj kaj nuntempaj albanaj toskoj (albanoj parolantaj la toskan dialekton).

1) ...MKALMSTKE  
 2) OMIBAPÆEIA..O  
 3) APK[I]AΓMETIMEI  
 4) APKAKOKLEMIΛEΓ  
 5) .AMEMAMAMAI

Kaj tiu grava filologia malkovro t.e. la ebleco decifri la malnovajn surskribojn de la Malgranda Azio, Grekio kaj Italio kaj de la insuloj pere de la albana, sufiĉas por solvi definitive la etnologian problemon de la pratempaj loĝantoj de tiu landoj. Sed prefere ni pritraktu la surskribojn mem.

## La surskribo de Frezo

Ĝi estas trovita de prof. Halberr en la jaro 1893 dum la fosadoj en Italio.

La surskribo estas farita per literoj de la arkaika jonia alfabeto βουτροφιδων; sekve ĝi apartenas al la 6-a jarcento antaŭ Kristo. Por plifaciligi la studon, tamen ni transkriptu ĝin kiel tuton de maldekstro al dekstro, samkiel ĝi estas en la originala teksto.

La heteokreta surskribo supre ŝajnas esti pli kompleta el ĉiuj tri disponigitaj - skribas Robert d'Angely, ĉar ties ĝenerala senco ŝajnas al ni pli klara kaj pli facila por traduki. Kelkaj literoj en ĝi mankas, entute 5 aŭ 6, sed ne estis malfacile

re trovi ilin, ĉar ili respondas perfekte al tiuj literoj, bezonataj por kompletigi la sencjon. Eĉ se oni demetus tiujn unusilabajn pecetojn el la teksto, la memstaraj nomoj estas entute tri:

ΑΡΚΙΑ, ΑΡΚΑΚΟΚΛΕΜΙ,

Kaj la sep aliajn, kvankam mankas interpunkciaj signoj, estas malfacile por distingi unu disde la alia kaj neniu el ili alportas dusencaĵon aŭ hezidadon. Laŭ la senco, jen kiel oni devas kompletigi la malplenajn lokojn kaj kiel oni devas dividi la literojn laŭ la vortoj, por ke oni igu la tekston legebla. La saman tekston transkriptitan en la nuntempan albanan, ĉiu albano, gego aŭ tosko (de ambaŭ dialektoj) povus facile traduki:

*Post reviviĝo estigita de la knabino tajo  
 Arkio savita de Arkakoklesi  
 Donas poste pagon al Anaiso*

(Pas ngjallmit<sup>1</sup>) qē bëri vajza<sup>2</sup>) tajo<sup>3</sup>)  
 Arkia shpëtuemja<sup>4</sup>) Arkakoklesi)  
 Yep<sup>5</sup>) (për Jep)<sup>6</sup>) pas<sup>7</sup>) pagën Anaisë.)

Kaj tiun ni tradukas jene:

Post la reviviĝo estigita de la virga junulino  
 Arkia savita, Arkakoklesi  
 Donas pagon poste al Anaiso

(Pas ringalljes qē bëri vasha e virgjër  
 Në Arkia, qē ka shpëtuar, Arkakoklesi  
 I jep pas pagën Anaisë.)

Sekve, ĉio ĉi supre estas ia rimarko, ĉar la senco de la surskribo estas jena: Arkakokleso por la diino Anajtis Virgulino donas rekompencjon por la saniĝo de Arkio, sendube ties edzino, pro grava malsano, pri kiu la surskribo ne parolas.

## La kariaj surskriboj


Laŭ Herodoto, karianoj estis dum la antikva epoko civitanoj de Minos, la reĝo de Kreto, kaj sub la nomo de lelejoj ili regis preskaŭ ĉiujn insulojn de Egea maro. Lakonio aŭ Lacedemonio antaŭ grekoj, laŭ Paŭzanio (4-a jarcento antaŭ Kristo) aŭ Heziko nomiĝis: Lelegio, kaj samtiel nomiĝis lelejoj la loĝantoj de Tesalio, Lokrido, Akamano kaj Leŭkadio (Aristotelo). Laŭ Herodoto, karianoj agnoskis lidianojn kaj mizojn kiel siajn fratojn, kaj tiu parenceco tradicia inter karianoj kaj lidianoj kaj aliaj popoloj pelazgaj de Malgranda Azio pruvigas ankoraŭfoje klare per la esplorado de la lingvo de karianoj.

Pli ol 50 jarojn antaŭe en Egiptio estas

# Historie

malkovritaj kelkaj kariaj surskriboj, gravuritaj de kariaj soldat-dungitoj. La mallongaj surskriboj, konsistantaj nur el du vortoj en sia plimulto estas skribitaj per grekaj literoj, sed ili havas ankaŭ restaĵojn de la pelazgaj alfabetoj.

Jen dulingva surskribo karia-egiptia (trovita sur stele de Memfiso en la muzeo Bulak).



La transkriptiĝo en la albana estas:

Ouma i Oaveathit, i kerkon Phta<sup>8)</sup> një vdekje të përshtatshme  
Ose më mirë: një varrim (savan)<sup>9)</sup> të përshtatshëm.

Ouma de Oaveath postulas al Phta taŭgan morton  
Aŭ pli bone: taŭgan entombiĝon (savan).

## La surskribo de Lemnos

Tiu surskribo estas trovita en la jaro 1886 en la vilaĝo Kaminiás sur la insulo Lemnos. Pluraj lingvistoj klopodis deĉifri ĝin sed malsukcese. La tirenaj pelazgoj loĝis en tiu insulo antaŭ ties okupado de atenanoj en la jaro 510 antaŭ Kristo. Laŭ Straboni (el la jaro 221) tiuj loĝantoj fondis la tirenan popolon aŭ etruskan popolon de Italio. Oni supozas, ke tiu surskribo estas gravurita ĉirkaŭ la jaro 510 antaŭ Kristo. Jen ties kompleta teksto.

### I.

- 1) ΠΟΝΑΙΕ Σ ΜΑΦ ΟΘ ΣΙΑΣΙ : 2) ΜΑΡΑΣ : ΜΑΦ
- 3) ΣΙΑΣ ΥΦΕΙ Σ : ΑΦΙΣ 4) Ε ΦΙΣΘΟ : ΣΕΡΟΥ ΑΙΘ
- 5) ΣΙΑΣΙ 6) ΦΑ ΜΑΡΑ ΣΙΑΣ : ΣΕΡΟΜΑΙ : ΜΟΡΙΑΙΑ
- 7) ΑΚΕΡ : ΤΑΡΑΣΙ Ο

### II.

- 1) ΠΟΝΑΙΕ ΣΙ : ΘΟΚΙΑ ΣΙΑΣΕ : ΣΕΡΟΥ ΑΙΘ : Ε ΦΙΣΘΟ : ΤΟ
- 2) ΣΕΡΟΥ Α ΡΟ Μ : ΒΑΡΑΣΙ Ο : ΣΙΑΣΙ
- 3) ΕΙΣΤΕΙ Ο : ΑΡΑΣΙ : ΤΙΣ : ΘΟΚΕ ΣΙΑΣΙ :
- 4) ΑΦΙΣ : ΣΙΑΣ ΥΦΕΙ Σ : ΜΑΡΑΣ Μ : ΑΦΥ : Α Θ Μ ΑΙ

Transskribitaj en la albanan la du pelazgaj tekstoj jenas:

### I

- 1) Ollaj, që njez zit' e tua, 2) Mars maj;
- 3) Sialli ku që avis 4) viset e tu ; shëron aith
- 5) Siva 6) La mala siell, shëron ai morinasit
- 7) Ahere o tavarz

### II

- 1) O llauz (kur) si phokja soli ( u sul): shpëtonte

- 2) Aith visthin e ti
- 3) dhe të nderonte, rro me. O harall, sivaj (rro) epte zi, u arratis phokja, sivaj;
- 4) Avis, u sul ky që, marazi im, Avis; ah, umbi au.

En la surskribo I la mortinto Tavarzi Harali el Myrina, urbo sur la insulo Lemnos, sin laŭdas ĉar li savis la patrujon en la komenco de okupado fare de najbaroj, loĝantaj en la duoninsulo Trako, kaj poste de maleasianoj de la lando Mala aŭ Malea. Oni alvokas la popolon de la insulo Lemnos per la vortoj skribitaj de la gravurinto konservi longan ĉagrenon - (albane: marazon) - pro la perdiĝo de tia patrioto.

En la dua surskribo oni diras, ke la heroo estas savinta sian patrujon kontraŭ la okupacio fare de foceanoj, kvankam li mem pereis antaŭ ol la batalo finiĝis. La gravurinto anoncas al la murdito en la transmondo, ke la finvenko estas akirita fare de liaj sampatriotoj, kiuj devigis la foceanojn retiriĝi. Tamen la malfeliĉo ne povis esti evitita, ĉar la unua malamiko, la najbaroj el Trako, sukcesis denove sklavigi la landon. Tial oni vokas la heroon renaskiĝi kaj denove batali por savi la patrujon. La gravurinto siaflanke esprimas sian bedaŭron - marazon - ĉar li forestis dum la dua, tiom malfeliĉa okupacio, konvinkita ke se la heroo ne estus mortinta, la patrujo estus saviĝinta ankaŭ tiufoje, samkiel la unuan fojon.

## Likaj surskriboj

En ĉi tiuj surskriboj oni rimarkas, ke ili estas ofte dulingve gravuritaj en la likia aŭ albana, poste en la greka. Jen unu el ili:

- 1) ΑΒΥΤΕΝΥ ΕΤΑΤΩ ΜΑ ΝΑ ΠΡΕΝΕΦΥ ΤΩ ΠΟΛΑΝΙΑΡ ΜΟΛΛΕΙΑΣΑΤ ΣΑ ΔΡΑΡΡΑ ΠΟΛΑΝΙΑΡ ΡΟΡΕΤΕΜΑΤΑΤΑ
- 2) ΠΡΕ(Ε)ΜΑΞΕΙΑΤΕ ΤΡΙΓΕ ΛΑΔΡ ΑΤΤΑΤΑ ΣΑ ΤΕΔΑΡΕΜΑ
- 3) ΣΑΕ ΙΑΤΕ ΣΑΡΕΤΑ ΔΕ ΤΕ ΚΑ ΣΤΑΤ(Ι) Α ΒΑΤΕ ΜΑΕΙΑ (ΤΟ)ΒΑ(Ε)ΤΕ ΠΟΝΑΜΑΧΧΕ ΑΡΑΔΑΤΑΛΕ : ΑΔΡ : Λ

- 1) Τούτο τὸ μνημεῖον ἐργάσαντο Ἀπολλωνίδης Μολλίσιος καὶ Λαπάρας Ἀπολλωνίου Πυριμάτιος.
- 2) Οἱ κείνοι ἐπὶ ταῖς γυναικῶν αἰῶν καὶ τοῦ ἐγγόνου.
- 3) Καὶ ἂν τις ἀδικῆσῃ τὸ μνημεῖον τοῦτο, ἔξωλεα (καὶ) παύλεια ἐστὶ ἀπὸ τῶν πάντων.

Jen ankaŭ la albana traduko:

E bënnë ctatën, me ne prinretë, Pulenidha Mullijesi  
Dhe Dapara Pulenidha Purihimetësi:  
Një njerzi për gratë e tyre dhe djemtë.  
Po të jet se viret (njeriu) në dhe te ky varr, bëre (prej) neje, t'u bjerë pun'e madhe dhe hall e mi halle: ose dha: <(kaqë)

Oni faris la kavajon kun ni, gepatroj, Pulenidha Mullijesi  
Kaj Dapara Pulenidha Purihimestesi:



Unu homaĵon por iliaj edzinoj kaj filoj  
 Se la homo entombiĝas kaj ĉi tombo  
 Farita de mi, estigu al ili multe da damaĝo kaj  
 Plej grandajn malfeliĉojn.

La alia surskribo:

1) ↑ ΒΥΞΙΝΥ ΣΤΑΤΟ (Μ)Υ ΤΕ ΠΡ(Ξ)Ν(Α)Ρ(Α)ΤΥ  
 ↑(Λ)ΑΤΕ Α(Τ)ΑΕ Α) ↑ΒΕ Σ(Α) ΤΕΔΡΕΜΑ  
 2) (Α) ΒΛ(Α)Ο ΑΥ(Ο)ΤΕ (ΧΜΑ) Τ(Ε).  
 1) Κατεσκευάσαντο (οἱ συγγενεῖς καὶ)  
 ἑλπ(ο)ῖατ(ι)ς ἐλαυτῶ(ι)ς καὶ τοῖς τέκνο(ι)ς αὐτοῦ  
 2) (Ἡγοράσας αὐτὸ Ἀκούσας μετ' αὐτοῦ.)

### Dulingva surskribo el la urbo Tloë

La albana traduko:

E bënnë ctatun me ne prinjatët  
 Elpeti (vehtë) vehtes d(he) djemëvet  
 E bleu Akuti me të.

Oni faris tion kun ni gepatroj  
 Elpeti (mem) al si kaj al filoj  
 Aĉetis Akuti kun ĝi

La traduko en la albanan lingvon:

E bëni kupën (varrin) me ne prindretë  
 Sbukaza djal' i Kigndanobës  
 Nip i Temosemotës.

Oni faris kavajon (tombon) kun ni gepatroj  
 Sbukaza, filo de Kigndanoba  
 Nepo de Temosemota

1) ↑ΒΑΕΙΑ: ΑΡΑΦΑΞΕΙΑ: ΜΑΤΕ: ΠΡΙΝΑΡΑΤΥ:  
 2) ΣΕΔΡΕΙΑ: Γ(Α)Ρ(Μ)ΨΝΑ+: ΤΕΔΡΕΜΕ  
 3) (Α)Ρ(Γ)Ε: ΑΤΑΕ(Α)ΒΕ Σ(Α)ΛΑΕ: ↑ΒΕ:  
 4) Σ(Α) ΤΕΔΡΕΜΕ: Γ(Ο)ΒΕΛΛΙΑ

Τὸ μνήμα τὸδε ποιήσατο Σιδάριος Παρομενόν.  
 τὸς υἱὸς, αὐτῶ καὶ τῆ γυναίκῃ καὶ υἱῶ Πυρίδῃ.

### Dulingva surskribo de Limyris

La transkriptiĝo kaj traduko en la albanan:

E bëni varrin me të prindretë  
 Sidereja djal' i Parmenajt  
 Për vehten dhe gruan' e (ti) veht.  
 Dhe djalin Pubielene.

Oni faris la tombon kun gepatroj  
 Sidereja filo de Parmanaj  
 Por si mem kaj ties edzino  
 Kaj la filon Pubiliene

1) ↑ΒΥΞΙΝΥ ΠΡΙΝΥΦΟ: ΜΑΤΕ ΠΡΙΝΑΡΑΤΥ  
 2) ΕΥΤΑ: +ΛΑ+: ΤΕΔΡΕΜΕ: +ΡΗΕ ΛΑΕ: Α+ΒΕ  
 3) Σ(Α) ΤΕΔΡΕΜΑ: Α+ΒΕΙΑ:  
 4) Σ(Α) Ε ΙΑΤΕ ΑΔΕ: ΤΕΚΑ: ΜΥΤΥ: ΜΑ ΝΑ ΧΑΣΤΩ:  
 5) ΨΝΕ: ΧΑΡ+Ε: Α Ε ΒΕΙΑ: Σ(Α) ΦΑΡΕ: ΦΑ+ΣΤΑΞΕ

ΪΚΤΑΣ ΧΛΑΧ ΑΝΤΙΦΕΛΛΙΤΗΣ ΤΟΥΤΙ ΤΟ ΜΝΗΜΑ  
 ΠΡΑΞΑΤΟ ΑΥΤΩ(Ι) ΤΕ) ΚΑΙ ΓΥΝΑΙΚΗ ΚΑΙ ΤΕΚΝΟΙΣ  
 ΕΑΝ ΔΕ ΤΙΣ ΑΔΙΚΗΣΗ(Ι) Η ΑΓΟΡΑΣΗ(Ι) ΤΟ ΜΝΗΜΑ  
 Η ΑΝΤΩ ΑΥΤΟΝ ΕΠΙΤ(Ρ)Ψ(Ε)Ι.

### Dulingva surskribo el Antiphelli

La albana traduko:

E bënnë prinjati me të prinditë  
 Ikta Hlaj djalin, për gruan e ti  
 Dhe djemt' e tyre  
 Kush je të hedhë dica më të: mu në çast  
 Eni e quanj dhe e heth jashtë vatravet vëndëzvet.

Oni faris tion kun gepatroj  
 Ikta ploras pri filo por ties edzino  
 Kaj ties filoj  
 Kiu ajn estu, enĵetu ion en ĝin: imediate  
 Eni nomiĝas kaj ĵetas ekster la fokusojn de landanoj

1) ↑ΒΥΞΙΝΨ: ΥΟΡΨ ΜΑΝΑ ΠΡΙΝΑΡ(Τ)ΑΤΨ  
 2) ΣΒΕΚΑΤΑ ΨΣΤΑΝΟΒΑΤ ΤΕΔΡΕΜΕ  
 3) ΤΑΜΟΣΑΜΟΤΑΤ ΤΟΤΑΣ  
 4) ΖΠΙΓΑΣΑ

### Dulingva surskribo de Cyanis

## La frigaj surskriboj

La plej simpla surskribo apartenanta al  
 la 7-a jarcento antaŭ Kristo estas tiu malkovrita de  
 Kretschmer:

ΒΒΑΙΕΙΑΦΚΚΙΤ  
 ΑΓΑΘΑ

En la albana lingvo tiu teksto havas la  
 jenan ekvivalenton:

Arala ja bëri Babajt

Arala faris tion por la patro

## La etruskaj surskriboj

Estas nekompreneble kial ĉiuj aliaj  
 lingvoj, konataj aŭ nekonataj, estas komparitaj  
 jam al la etruska, sed estas forgesita la albana,  
 kiu estis ĝuste ties devenlingvo. Hodiaŭ ni  
 disponas pri multnombro da dulingvaj surskriboj,  
 gravuritaj en la etruska kaj latina, multajn vortojn

transvivintaj ĝis hodiaŭ en la lingvoj de Heziko kaj aliaj pratempaj aŭtoroj grekaj kaj romiaj, kelkaj di-nomoj, precipe diinoj en la etruskaj speguloj kaj en la tekstoj de la tombaj ŝtonoj. La studado de tiuj ĉi etruskaj restaĵoj pli profunde konvinkas nin, ke la malnova tirena pelazga, toska aŭ etruska, ne nur devas esti klasifikita inter la ariaj lingvoj, sed ankaŭ devas esti identigitaj al la hodiaŭ parolata albana. Ni havas ankaŭ la atestojn skriban de la romia imperiestro Klaŭdio la Dua, ilirdevena, do albana, en la tiutempaj etruskaj analogoj, pruvante tiel, ke la ilira, albana kaj la etruska konsistigas nur unusolan lingvon.

## Literaturo:

1. Prof H.H. Robert d'Angely: Enigma, Nga Pellazget te shqiptaret (Enigmo, de pelazgoj al albanoj) - resumis kaj tradukis Xhevat Lloshi, eldono

de TOENA Tirane 1998. Enkonduko fare de la filino de la aŭtoro Solange d'Angely, oktobre 1998

2. Prof H.H. Robert d'Angely: L'Enigme: vol. I Les Pelasges 1990 France; vol. II Des Thraces et des Illyriens a'Homere 1990 France; vol. III Des etrusques a l'Empire Byzantin 1991 France; vol. IV De l'Empire Ottoman-Les Albanais-De l'Epire 1991, France; vol. V Le secret des Epitaphes 1991 France

3. Aristidh P. Kola: Arvanitasit dhe prejardhja e grekeve- veshtrim historik-folklorik-politik-gjuhesor (Arvanitoj kaj la deveno de grekoj, trarigardo historia, folkloreca, politika, lingvistika) Eldonejo "55" Tirane 2002

4. Edwin Jacques: Shqiptaret - historia e popullit shqiptar nga lashtesia deri ne ditet e sotme (Albanoj - historio de la albana popolo ekde pratempo ĝis nuntempo) eldonejo "Lajmi i Mire" Tirane 2002.

1) **Ngjallmit**, signifas en la albana ĝuste *renaskiĝo*. Do ankaŭ 2000 jarojn antaŭe likianoj uzis tiun vorton samsence kiel nuntempaj albanoj: *mirakla saniĝo*.

2) **Vajza**. La vorto *junulino* havas kelkaj ekvivalentojn laŭ regionoj. Tiel ni konas: *vajza, vasha, vashëza, varsha, varzha, varza* k.a. Ĉiuj signifas: *junulino virga*, samkiel aliaj: *virgĵëshë, çupa, cuca, çika, goca* k.a.

3) Tio estas mallonga formo de te + ajo = tajo, signifanta: *ĉe ŝi tie aŭ pli fore ol: te kjo këtu = ĉe tiu ĉi, ĉi tie, troviĝanta pli proksime*. Ambaŭ ili estas inaj, dum la masklaj formoj estas: te + ay = *tay = ĉe li tie* por la foro kaj te+ ky = *ĉe ĉi tiu* por proksimo.

4) **Shpëtuesja** = savito: estas mallonga formo ina distingita de la pasinta participo de la verbo: *savi* (shpëtoj aŭ shpëtonj), kiu estas same aktiva kaj pasiva je la senco: *mi savigas kelkiun de la morto, de la droniĝo aŭ alia danĝero*, kiu en la pasivo kaj transitivo signifas: *saviĝas mem, mi eskapas*. Ekzemplo: *mi savis lin el la droniĝo*, kiu en la pasivo netransitiva signifas: *mi saviĝis, eskapas*. Ekz. *Mi saviĝis el droniĝo, de kuglo*. La pratempa formo kiu aperas en la teksto de la surskribo transkriptita per la latinaj literoj nuntempaj donas: *psetimen*. La antaŭlasta litero, se ni volas transkripti ĝin per grekaj literoj devas esti skribita ΠΣ.ETIMEYN, tiel kiel ĝi ja estas skribita en la teksto. Tiu formo: Arkia, Psetimen, t.e. : *Arkia = savita*, el la pratempa teksto, ĉirkaŭ du mil jaroj antaŭe, respondas al la gega dialekto de la albana signifanta: *Arkia = saviĝinta*, ĉar la toska dialekto diras: *Arkia = savita*, en la sama senco.

5) **Yep** - transkriptita per la literoj de la nuntempa albana kiel *Jep*, tradukiĝas per: *jep = donas*, triapersona prezenco de nominativo de la verbo: *jap = mi donas*.

6) **Pasë**, en la albana signifas *pli poste*, post la saniĝo de Arkia, Arkakokles donas; ne videblas verŝajna kelkiu alia eksplikoj por tio.

7) **P(a)g(ë)n, pagon** – ni opinias ke ĉi tie, kiel ofte okazas en la etruska, (aparte estas malfacile ĉe la araba kaj aliaj lingvoj mezopotamiaj) temas pri kutimo por mallongigi la vortojn, demetante el ili la vokalojn. Tiu ideo venis en nian kapon, ĉar ni ne vidas kia estus ja hitita vorto de Kreto, kiu estus komplete sen la vokaloj, bone sciinte, ke normale tiu lingvo, krome, ofte uzas ilin. Fakte, ĉi tiu vorto: *PGN*, kun tri konsonantoj, pro ilia pozicio en la heteokreta teksto, devas havi la sencon: *obligiĝo* por pagi al Anaij, kaj ni alvenis al la konkludo, ke intermetante la mankantajn vokalojn, ni ekhavas la vorton kompleta; tiel rezultigis la vorto kiu en la nuntempa albana respondas al la sama vorto: *pago*, signifanta tute la samon: *obligiĝo, pago, rekompenco*, k.a.

8) **Phta** - dio de fajro.

9) La morto montriĝas ĉi tie per *SAVN* (gegdialekte) kaj *dhe SAVAN* (toskdialekte).

## ĈU LA 9-a LANDA KONGRESO EN 2011 EN BJELOVAR?

Jam en la pasinta jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo estis proponite, ke la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj okazu en Bjelovar, por per ĝi omaĝi la 100-jaran datrevenon de la apero de la unua libroforma traduko el la kroata literaturo. En 1911 Fran Kolar krom publikigis sian tradukon de "La trezoro de l' orajisto" de August Ŝenoa. Post konsultiĝoj, al KEL estis sendita ankaŭ la oficiala letero de Dokumenta Esperanto-Centro, per kiu oni invitas la Estraron de KEL urĝe akcepti aŭ rifuzi Bjelovar kiel kongresurbon en 2011. Kiel avantaĝon de Bjelovar, la proponintoj akcentas ĝian proksimecon al Zagreb, kaj la tiean Esperanto-komunumon kiu, malgraŭ neekzisto de Esperanto-societo, estas konsiderinda, kaj la atmosfero rilate la Internacian Lingvon en Bjelovar estas tre stabila, inluzive de informmedioj.



# KROATOJ PREMIITAJ EN HAVANO 2010

 Redakcia kompilo




Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Havano (Kubo), Universala Esperanto-Asocio premiis siajn membrojn en diversaj kategorioj. Kroatoj povas fieri, ĉar la **Diplomon pri Elstara Arta Agado** ricevis du kroatinoj: aktorino **Vida Jerman** kaj verkistino **Spomenka Ŝtimec**. Dum ilia sukceso estis atendebla, la sukceso de **Josip Pleadin**, kiu gajnis du premiojn por poezio en la Belartaj Konkursoj estas vere surpriza. Por sia poemo **"Antaŭ via foriro"** li gajnis la duan, kaj por la poemo **"Ekzistas ie kaŝita loko"** la trian premion (la unua ne estas aljuĝita!). Kvankam kroatoj en aliaj kategorioj (prozo, teatraĵo, infanlibro) relative ofte ricevadis premiojn, tamen en la poezia branĉo tio estis tre malofta. Se ne konsideri la poetinon Zora Heide (kiu konkursis kiel svedino), kaj Vesna Skaljer-Race (kiu vivis en Beogrado), Josip Pleadin estas la dua kroata premiito en tiu kategorio, post Božidar Vancik, kiu gajnis la premion en 1951.



# NOVJARTAGA FESTO EN BANGLADEŜO

Se vi demandos geografon aŭ meteorologon "Kiom da sezonoj estas en Bangladeŝo?", li diros: "Somero, musono kaj mallonga vintro." Eble kelkaj el ili diros: "Bangladeŝo havas tipan tropikan klimaton kun somera musono." Se vi demandos iun, kiu vivas en lokoj super 60°N aŭ 60°S kaj loĝis en Bangladeŝo dum pli ol unu jaro, li diros: "Estas du monatoj da somero, du monatoj da pluvo kaj ok monatoj da infero!" Sed se vi demandos lernanton en lernejo aŭ plenaĝulon kiu estas pli konscia pri sia bangladeŝismo ol la aliaj ĉirkaŭ li, li respodos: "Bangladeŝo havas ses sezonojn." La respondo estas tia ĉar niaj poetoj diras tion al ni. Poetoj estas pli sensiva ol termometroj, barometroj kaj aliaj iloj kiuj gvidas la geografojn kaj meteorologojn. Ne estas iloj kiuj povas senti la subtilajn ŝanĝojn kiujn niaj poetoj povas senti en la naturo kaj atmosfero. La poetoj povas vidi kaj senti la plej malgrandajn ŝanĝojn en la nuboj, vento, arboj, tero, riveroj, suno, luno, kundutoj de bestoj kaj birdoj ktp. Ili povas vidi malsaman etoson post ĉiuj du monatoj. Do ili diras ke ekzistas ses sezonoj en nia tropika lando, kaj ni ĝuas kredi tion. La sezonoj estas 'griŝmo' (somero), 'borŝa' (musono), 'ŝoroth' (frua aŭtono), 'hemonto' (malfrua aŭtono), ŝit (vintro) kaj 'boŝonto' (printempo). Ni havas ses vortojn por la sezonoj. Eble aliaj lingvoj ne havas pli ol kvar vortojn. La unua tago de somero, kiu estas la unua tago de la unua monato nomita 'bojŝakh' en nia kalendaro en la mezo de aprilo, estas nia novjartago. Kompreneble ĝi estas oficiala festotago. La 14-a aprilo 2009 estis la 1-a de bojŝakh 1416. Antaŭ 1416 jaroj la loĝantoj de nia lado sekvis la lunan kalendaron.



*Muhammad Mahbul Huq*

La popoloj de Bangladeŝo havas multajn frustrajn. Niaj politikaj estroj perfidas nin, niaj negocistoj kaj industriistoj maljuste ekspulatas kaj manipulas la ordinaraj laboristojn. Niaj ekonomiistoj gvidas nian ekonomion laŭ la direkto de la estraroj de 'internaciaj' financaj organizoj en kiuj ne troviĝas iu kiu anataŭgardas la rajtojn de la malriĉaj ordinaraj homoj. Niaj intelektuloj prostituas iliajn talentojn al iliaj politikaj mastroj. Mi ne volas, aŭ pli ĝuste, mi devas ne paroli pri nia justico. Do la ordinaraj homoj kiel mi trovas esperon kaj senŝarigiĝon en niaj religiaj kaj kulturaj aferoj kiuj ankaŭ estas minacitaj per la kabla televido. Sed mi kredas, ke niaj tradicioj estas tiel riĉaj, profunde enradikiĝintaj, malnovaj kaj proksimaj al niaj koroj, ke ili povos travivi malgraŭ agreso per la kabla televido.

Ni festas la novjartagon en la novjartaga aŭroro, ne en la meznokto de la lasta tago de la pasinta aŭ pasanta jaro ĉar ni volas bonvenigi la novjaron pli ol adiaŭi la pasintan aŭ pasantan jaron. Mi ne komprenas kial tiuj kiuj festas en la meznokto, la feston nomas novjartaga festo. Eble ili devas nomi ĝin "festo de pasinta aŭ pasanta novjarnokto". La festado en nia lando estas markita per muziko kaj kantoj, sed ne per trinkado kaj dancado. Tiuj kiuj festas en la nokto kun trinkado kaj dancado laciĝas per la ŝovo de la nokto kaj devas ĉesigi la festadon aŭtaŭ la aŭroro. Ili ne povas vidi la alvenon de la novjartago kiun ili festas! En nia lando multaj homoj kolektiĝas aŭroro



en malfermitaj spacoj sub arboj. La viroj portas longajn maldikajn ĉemizojn faritajn el kotono. La virinoj portas kotonajn ŝariojn, kutime blankajn kun ruĝaj borderoj, ornamis la harojn per floroj kaj portas buntajn brakringojn faritajn el vitro. La kantadoj daŭras dum longa tempo. Estas por la okazo favorataj himnoj verkita de nia poeto Rabindranath Tagore kiu gajnis la Nobelprimion en 1913. Kiam la homoj aŭdas la kantojn, ili, inkluzive la riĉajn homojn el urboj, manĝas fermentitan rizon, kiu enhavas multe da akvo, uzante argilajn telerojn. La fermentitan rizon el argilaj teleroj la malriĉaj vilaĝaj terkultivistoj devas manĝi ĉiutage. Inter ni troviĝas cinikuloj kiuj kritikis kaj primokas la urbanojn kiuj manĝas la fermentitan rizon nur en unu tago en la jaro.

Post la kantado la homoj iras al la foiroj kaj partoprenas en la karnavalo, en kiu troviĝas multaj simboloj de nia kulturo kaj de gravaj eventoj el nia historio. Novjartage funkcias multaj malgrandaj vendejoj laŭlonge de la ĉefaj urbostratoj kaj sub la arboj. La infanoj aĉetas ludilojn kaj balonojn. En la foiroj troveblas objektoj por ĉies gusto. Speciale multaj kaj diversaj estas la manĝaĵoj tipe bangladeŝaj. Estas somero kun aeraĝe 37°C - 40°C kaj kun alta humideco, kaj ĉiuj bezonas malvarmajn trinkaĵojn kiuj fluas senĉese el la vendejoj. La prezo de kokosakvo kaj aliaj trinkaĵoj plialtiĝas. Samkiel



la foiroj en aliaj partoj de la mondo, ankaŭ en la bangladeŝaj foiroj oni trovas multe da senutilaj sed ĉarmaj kaj frandaj objektoj kaj bagatelaĵoj. Ĉiuj kiuj povas, aĉetas tiam ion por si mem kaj por donaci al aliaj. Homamasoj okupas la parkojn, vendejojn kaj karnavalojn. Ĉiujare la nombro de festoj kaj festantoj pligrandiĝas. La ordinaraĵoj, kiuj plejparte estas dungitoj, ne povas elspezi monon dum la novjartaga festo tiel kiel ili deziras. La dungitoj ricevas salajron la 1-an de aprilo kaj la festo estas en meo de tiu moanto, kaj ili ne ricevas bonifikon por tiu okazo. Oni diras al mi, ke en Irano la dungitoj ricevas bonifikon por ilia 'naŭroz' (novtago). En Bangladeŝo la dungitoj ricevas bonifikon dufoje jare dum la religiaj festoj. Ĉiujare la pligrandiĝo de homamaso partoprenanta en la festo kaj la populareco de la evento pensigis min, ke baldaŭ la dungitoj postulos bonifikon ankaŭ por la novjara festo.



Same kiel plejparto da homoj, mi ĝuas la festadon de la tago ekstere, en la lokoj kie troviĝas kantanta homamaso, foiroj kaj karnavaloj, malgraŭ la sufoka vetero. Bangladeŝo ne povis kontentige progresi ekonomie sed ĝi pliriĉiĝis kulture post sia sendependiĝo en 1971. Ĝi ankaŭ plibonigis siajn literaturon kaj artojn. Ne estas multaj eventoj kiel la Novjartago, kiu unuigas la popolon de la lando. Novjartago kunigas adeptojn de ĉiuj politikaj ideologioj, religioj kaj regionoj de la lando. En la nuna tempo estas komuna alarmo en ĉiuj festoj de la mondo. Tio estas terorismo. En aprilo 2001 (bengala boiŝakh 1408) okazis eksplodo de bombo en nia plej granda kunveno lokita en la bangladeŝa ĉefurbo. La bombo mortigis kelkajn homojn kaj vundis multe da aliaj. La venontan jaron ni vidis pli grandan kunvenon en la sama loko. La teroristoj (nepublikaj aŭ registaraj) ne povas kompreni, ke bomboj ne povas haltigi la fanfaron de kulturo, nek bajonetoj la spiriton de sendependeco, nek malliberigi la liberecon de esprimiĝo, nek aliaj persekutadoj la religian adoradon de la fideluloj.

### Rememoro pri mia ensalto en la kroatian Esperantujon

# HAZARDA RENKONTO KAJ LA UNUA EKSPOZICIO DE ESPERANTO-POŝTMARKOJ EN KROATIO

 Nikola Turk

Estis jaŭdo, la 26-an de novembro 2007. Mia ĉiutaga promenado al la Placo de Petar Krešimir la 4-a, havas la celon protekti mian sanon kaj fizikan staton. Preterirante tiun tagon la hotelon "Sheraton", okazis hazarda renkontiĝo kun la radio-jurnalisto Tomislav Radić. Rapide preterpasante, iu homo salutis: "Bonan tagon!" Mi tuj respondis: "Buenos días!" pensinte, ke tio estis saluto en la hispana aŭ en iu latinamerika lingvoj. S-ro Radić diris, ke temas pri la internacia lingvo Esperanto kaj ekplakis al mi, ke s-ro Milošević estas vicprezidanto de Kroata Esperanto-Liĝo.

Interparolante, mi eksciis, ke en la jaro 2008 oni festos centjariĝon de Esperanto en Kroatio. Tuj venis al mia memoro, ke mia edzino vizitis kun kroatiaj fervojistoj-esperantistoj en 1953 la Esperanto-kongreson en Stokholmo. Sekvis tiun rememoron la rememoro pri sepdekjara okupiĝo pri filatelismo kaj partopreno en naŭdek ekspozicioj, el kiuj kvardek kun tre specialaj temoj, plej ofte sportaj, sed ankaŭ pri flaŭro, faŭno, universo, kulturo, astronautiko kaj pri diversaj elstaraj homoj de la mondo kaj de Kroatio, la papo en Kroatio, Nikola Tesla, diversaj pentristoj, verkistoj kaj granduloj kroatiaj.

Mi iomete cerbumis pri miaj poŝtmarkoj kaj t.n. filatelaj memorigaĵoj, kaj mi demandis min: "Ĉu mi havas ion pri Esperanto?" Post tiu renkontiĝo, anstataŭ promeni en la parko, mi alkuris al mia ne tro malproksima loĝejo, kie mi nervozeme trarigardadis



*Nikola Turk en sia ŝatata medio - inter filatelaĵoj*

okdekon da albumoj kaj ankoraŭ pli multaj mapojn, kovertojn. Kaj, ho, ho, ho - mi trovis dekvin diversajn kovertojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj aliaĵojn. Jen la ebleco organizi la unuan filatelan Esperanto-ekspozicion okaze de la jubilea festado de Centjariĝo de Esperanto en Kroatio!

Pri tri sukcesaj ekspozicioj oni jam scias multon. Sed ni rememoru, ke la unua okazis en majo de la jubilea jaro 2008 en la muzeo "Mimara", poste sekvis la tre abunda ekspozicio en novembro ĉe la Filozofia fakultato okaze de la simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco", kaj la lasta

estis organizita en decembro, ĉe la solena kunveno en la Urba magistrato kaj Parlamento, tuj apude al la Placo de Sankta Marko. Al la sukceso de ekspozicioj kontribuis eldonoj de la koverto kun la nacia himno "Bela nia patrolando", la stampo de la solena tago kaj la poŝtkarto kun represo de la frontpaĝo de la unua numero de "Kroata esperantisto" el la jaro 1909 kaj kun surprisita poŝtmarko kiun speciale designis s-ro Hrvoje Šercar, uzante la bildon de la monumento "La futuro", starigita antaŭ la Ekonomia fakultato en Zagrebo, dum la 86-a UK en 2001.





## LA UNUA MEMSTARA EKSPOZICIO DE NIKOLA TURK Radenko Milošević

Post la vizito al la unua memstara ekspozicio de UZE-membro prof. Nikola Turk, karese nomita Niĉjo, mi skribis en la memorlibro, ke “estas nejuste ke Dio disdonis tiom da diversaj talentoj al li, kaj post tia abundeco donita al li, por ni ne restis tro multe!”

Profesoro de kineziologio, pentristo, pedagogo, ĵurnalisto, filatelisto, sportisto en pluraj sportdisciplinoj (skiado, montgrimpado, bokso, gimnastiko), li estis ankaŭ atletikisto ekde sia junaĝo ĝis la nuna tempo. Li atingis vivpintojn kaj sportajn sukcesojn preskaŭ nepriskribeblajn, kion kompletigas lia majesta kolekto de sportmedaloj kaj diplomoj, grandega nombro da gazetaj eltondadoj pri liaj atingoj kaj la belega kaj ampleksa kolekto de filatelajoj.

Nia membro, s-ro Turk, kiu estis naskita en la komenco de la jaro 1929, komencis sian pentradon tre-tre frue. Unue, per oleaj farboj li pentris malgrandan kapeleton super Draga ĉe Martinščica en 1936, kaj jam en la jaro 1942 li pentris sur lignolameno malgrandan pentraĵon. En la gimnaziaj jaroj al li diris liaj pentristaj mentoroj: “Ne iru al pentroakademio, vi havas talenton, sed okupiĝu pri sporto!” Tio direktis lian vivosorton al diversaj muzoj, ĝis la naŭa jardeko de lia vivo.

Diversaj manieroj de lia pentrado per oleo, krajono, tuĉo, pasteloj, akvareloj kaj aliaj iloj, estas la perlaro de lia arto. Dum la tuta krea periodo li aŭtoris multajn pentraĵojn en diversaj cirkonstancoj kaj eĉ en tre strangaj spacoj: armeaj, laborbrigadaj, lernejoj kaj diversaj aliaj. Iom post iom, al li venis la ideo, ke samtempe kun komunaj ekspozicioj, maturiĝis la tempo por memstare ekspozicii. Hazarda aliĝo kaj membriĝo al la “Grupo 69” de la Asocio de pentroartistoj, rezultis per la instigo, ke en

sia naŭa vivjardeko li memstare ekspoziciu, pri kio li konfesis: “Tion mi ĉiam deziris!”. Per vortoj estas tro pene priskribi lian (pentro)arton: liaj lekantoj, papavoj, siringoj, olivarboj, korboj plena da fruktoj kaj pejzaĝoj, estas parto de lia sperto kaj vivaventuro kiun li donacas al ni. Prefere li mem parolu per siaj pentraĵoj.

Kaj fine ankoraŭ io: lia unua memstara ekspozicio estis riĉigita per lia ludado de muzik-sintezilo kaj buŝharmoniko! Dankon Niĉjo!

Ni aldonu la tradukon de la artikolo el la osijeka gazeto “Glas Slavonije” de 2-a de septembro 2010, okaze de la 14-a internacia atletika ĉampioneco, okazinta en Osijek la 30-an de aŭgusto 2010, kiun prof. Nikola Turk partoprenis kiel veterano:


*Kuracistoj prognozis antaŭ multaj jaroj al la nun 82-jara Nikola Turk, nur ankoraŭ kelkajn monatojn da vivado. Kaj nun la fama kaj rekonita kroata atletika entuziasmo el Zagrebo estas ĉiam pli aktiva kaj – treege rimarkebla. La homo kun neelĉerpebla energio, kiu pasintjare kuris 19,96 sekundojn en 100-metra kurado, kiu partoprenis en “Gradski vrt” en kvar disciplinoj, sukcesis en 200-metra kurado plibonigi la kroatian kaj mondan rekordojn en sia 82-a jaro al 13,4 sekundoj. Certe partoprenis ankaŭ pli junaj veteranoj kun brilaj atingoj, sed profesoro Turk altiris grandegan atenton!*

# MI LA MUZEON, LA MUZEO MIN

*✍ Smail Grbo*

Mi pliriĉigas kaj ordigas mian "Esperanto-muzeon", kaj ĝi samtiel faras por mi mem. Ĝi influas al mi ĉiam inspire, al vizitantoj-esperantistoj instige, kaj al neesperantistoj informe, ĉar ĉi tie ili plej evidente ekscias kio estas Esperanto, kio esperantismo, kio esperantisto, kiel agi por Esperanto kaj kiel ĝui en ĝi kaj per ĝi. Ĉi tie oni povas ekscii ankaŭ multon pri la vivo kaj pri la mondo. Tio estas mia regno, tie mi estas caro – Caro Smailo.

Mia Esperanto-muzeo (muzeeto) ne estas nur Esperanta, kaj ne nur muzeo. Fakte, tio estas biblioteko, kolektoje, memorarĝejo ...



respektive la ĉambroj de libroamanto, kolektanto, mondvojaĝanto, esperantisto, instruisto, 20-obla hobiulo. Kio enestas? Libroj (ĉ. 1200 en/pri Esperanto, 600 en la germana kaj ĉ. 3.000 en la nacia lingvo), Esperanto-jurnaloj el kvindeko da landoj, leteroj el 55 landoj (aparta kolekto de miaj karmemoraj Tibor Sekelj kaj Marinko Gjivoje, kaj de Indira Gandhi), Esperantaĵoj (insignoj, butoninsignoj, flagetoj, turismaj prospektoj kaj bildkartoj, glumarkoj, kraĵonoj, ĉemizoj, gazetaltranĉaĵoj, kasedoj, ktp), vojaĝmemoraĵoj el kvar kontinentoj, kolektoj de murkalendaroj, 10.000 bildkartoj, poŝtmarkoj, moneroj, insignoj, kraĵonoj, lumbildoj, video- kaj sonkasedoj, gazetartikoloj (pri mi, pri Esperanto, de mi), dek fotiloj, kvar kameraoj, projekciiloj, diplomoj-plakedoj-dankleteroj, miaj amatoraj kino- kaj videofilmoj, 120 laŭtemaj fotoalbumoj, miaj propraj eldonaĵoj (libroj kaj libretoj), ktp, ktp.

Precipe karaj al mi estas la jenaj libroj: "Esperanto – lernolibro por memlernantoj" de Antonije Sekelj (el kiu mi hazarde komencis lerni nian lingvon antaŭ preskaŭ 50 jaroj), "La Unua Libro" de LLZ, libroj de Tbor Sekelj, leksikonoj de Gjivoje kaj Pleadin, kaj, kompreneble, miaj verkoj: "Esperanto u škole", "Jezik prijateljstva", "S esperantom po svijetu" (vojaĝpriskribo kaj aldona KD kun 200 miaj privojaĝaj fotoj), "Mi Estas Esperantisto" (kun tre favora recenzo de famulo William Auld), "Ja sam – ne samo – esperantista" (+KD), "Car Smailo" ...

La nomo de mia muzeeto estas MEDIKAMENTO AL ANIMO. Kaj la animo de mia koro kaj de ĝia koro estas ESPERANTO. En tiun ĉi ĉambron mi investis multe da tempo, mono, kono, peno kaj amo. Ĉiu aĵeto havas ĉu senperan, ĉu peran ligon kun Esperanto, aŭ almenaŭ kun ĝiaj ideoj. Car Esperanto por mi ne estas nur lingvo, sed ankaŭ

# AMUZIĜU KUN DAMORU


## Trailokyanath Mukhopadhyay: Damoruov život („La vivo de Damoru“)

La bengala verkisto Trailokyanath Mukhopadhyay per la romano "Damoruov život" (La vivo de Damoru) malfermas la pordojn de du interesaj mondoj: la mondo de la bengala kulturo kaj la mondo de senlima fantazio. Guste tial mi povas diri, ke "La vivo de Damoru" estas bonega libro por ĉiuj kiuj ŝatas amuzajn kaj fantaziajn rakontojn. Damoru estas sendenta kalva maljunulo, kiu sin tamen konsideras belulo. La romano konsistas el liaj anekdotoj, kiujn li mem rakontis al siaj geamikoj. Liaj kunvilaĝanoj ariĝas ĉirkaŭ li por aŭdi liajn fantaziajn, fantastajn, mistikajn kaj eĉ dubindajn rakontojn en kiuj aperas multaj personoj, sed ankaŭ supernaturaj estaĵoj, hinduaj dioj, ekzotikaj animaloj, fantomaj, ĉarlatanoj ... La vivo de Damoru estas ekscitega; li batalis kontraŭ bestaĵoj, postkuris la

miraklan flugkesteton, renkontis dion de morto ... La plej bizara estas la rakonto pri akcidento, en kiu Damoru restis sen malsupra korpoparto, kaj tiam oni lin kunigis kun korpo de bovino. Tiun miraklan kunligitaĵon oni poste eĉ melkis. Tiaspecaj rakontoj estas paradoksaj kaj dubindaj, sed Damoru ĉiam havis pruvojn, kvankam ili estas dubindaj same kiel liaj rakontoj.

"La vivo de Damoru" tamen ne estas nur libro por amuziĝi, sed ĝi estas ankaŭ kritiko de la bengalaj aŭtoritatoj kaj socio. La bengala tradicia socio estis dividita en kastojn, kaj malaltaj kastoj, precipe malriĉuloj kaj knabinoj, estis bagateligitaj kaj subpremitaj. Dum riĉuloj plezuregis, la malriĉuloj suferis. Ĉio tio troviĝas malantaŭ la amuza rakontado, kaj tiel la romano fariĝas socia kritiko kaj per satiro klopdas krei pli bonan

 Mihaela Cik



bengalan socion.

Amuza, fascina, instrua, impresa, ekzotika ... estas bonegaj vortaj por priskribi la romanon "La vivo de Damoru". Se vi deziras ĝui la mondon de fantazio kaj ekkoni unu alian kulturon, legu tiun ĉi romanon. Ĝi estas vere leginda.

ideologio, sociologio, filozofio, kulturo, scienco, humanismo, arto, pedagogio, amuzo ... , la tuta muzeo estas ankaŭ ESPERANTO. Kaj mi estas ESPERANTO.

Pri mia Esperanto-muzeo skribis kelkaj naciaj gazetoj (ankaŭ la ĉina Ren-min-ribao). Sed, tie kaj en alia ĉambro kiun mi nomas "kabineto", la Federacia televido faris dokumentan filmon "Caro Smailo-Esperanto", en kiu mi parte parolis Esperantlingve. La filmo estas tradukita ambaŭlingven kaj tiel prezentita! La kopiaĵon mi posedas (kiel ankaŭ de ĉiuj 13 miaj TV-intervjuoj). En la *Libro pri impresoj* estas enskribitaj kaj subskribitaj ofte longaj interesaj impresoj de samlandanoj kaj eksterlandanoj, esperantistoj kaj neesperantistoj, amikoj kaj nekonatoj, junaj kaj maljunaj. En Esperanto kaj bosna-kroata-serba, sed ankaŭ en la germana, persa, korea, araba, bulgara, franca... Profesoro Tandir "riproĉis": "Ĉi tio ne estas muzeo, sed la flughaveno de kie oni ekflugas al iuj novaj mondoj." Per sia vizito honorigis min ankaŭ akademiano kaj samideano Dalibor Brozović.

Por faciligi la kontakton, jen mia adreso:  
Smail Grbo, Vrbovska 60, BA-71000 Sarajevo,  
Bosnio kaj Hercegovino  
sarajevoespero@hotmail.com  
smailo@bih.net.ba  
tel. +387-33-659-750



# INTERNACIA AGNOSKO Radenko Milošević

## DE LA KROATA LINGVO

### memstareco laŭ bibliografiaj kaj ISO-normoj

Internacia normiga organizo (= International Organisation for Standardization - ISO) per oficiala letero de la 17-a de junio 2008 konfirmis la akcepton de la signo "hrv" por la kroata lingvo en novaj bibliografiaj kaj terminaj aplikoj. La akcepto de la signo "hrv" estis oficialigita kiel ISO 639, la 28-a de junio 2008. La malnova signo "scr" por la kroata lingvo validas ankoraŭ kaj ne estos ŝanĝita estonte. La menciita decido estas la krono de la multjaraj intencoj kaj streboj de la Nacia kaj universitata biblioteko en Zagrebo kaj de multaj lingvistoj, verkistoj kaj politikistoj, por ke oni konfirmu nacian signon por la kroata lingvo kiel fundamenton por la kroata kultura kaj scienca laboroj kaj identigo de la kroata lingvo en la mondaj bibliografiaj kaj informadikaj bazoj. Samtempe, enkadre de la universala decimala klasifiko (UDK) oni atribuis por la kroata lingvo la indikon UDK 862 (kun la mallongigo: hr). La decido pri la ŝanĝo de signo por la kroata lingvo en la originala tabelo, anglalingve aspektas kiel en la ĉi-suba tabelo:

Tiu decido estas la fina rezulto en la lukto por la kroata nacia lingvo, sekve por memstareco de la propra lingvo. En ŝtono ĉizitaj, en libroj presitaj kaj en mane skribitaj kroatlingvaj tekstoj troveblas la radikoj de la kroata lingvo. Tiuj lingvaj fontoj etendiĝantaj ĝis la kroata literaturaj kaj monumentaj tradicioj de la frua mezepoko, radias la civilizajn atingojn de la kroata lingvo. Malsimilecon kun la aliaj sudslavaj lingvoj oni povas rimarki ankaŭ en la skribitaj radikoj de la kroata lingvo.

Brilas tiukampe la plej malnovaj glagolicaj monumentoj el la 11a jarcento: la tabulo de Valun, la surskribo el Krk, la tabulo de Baška, kaj la Vinodola leĝaro el 1288, kiuj estas la perloj de la kroata lingvo. Oni aldonu nur kelkajn elstarajn verkistojn kaj kreintojn de la kroata lingvo: Šiško Menčetić, Đore kaj Marin Držić, Andrija Ĉubranović, Mavro Vetranić, Marko Marulić, Hanibal Lucić, Petar Hektorović, Petar Zoranić kaj Faust Vrančić, Bartul Kašić, Juraj Habdelića, Ivan Bilostinac kaj multaj aliaj. Jam antaŭ kvin jarcentoj (en la jaro estis 1501!) kroatoj havis la eposon

"Judita", kverkitan en kroatlingvaj versoj de Marko Marulić, la patro de la kroata literaturo.

La dekretoj de du papoj - Gregorio la 15-a el la jaro 1622, kiu por la teritorio de Venecia Respubliko ordonis fondi la katedrojn por la araba kaj "ilira" (t.e. kroata) lingvoj, kaj de la papo Urban la 8-a, kiu en la jaro 1622 ordonis, ke en ĉiuj altlernejoj kaj universitatoj en Eŭropo oni devige instru kaj lern, almenaŭ dum du jaroj, krom la latina, greka, hebrea, aramea/kaldea kaj araba lingvoj, ankaŭ la "iliran", t.e. kroatan lingvon. Oni povas diri, ke temis pri iaspeca paradokso, ke la "ilira" (t.e. la kroata), tiampe ankoraŭ nestandardigita, per la dekretoj de la du papoj fariĝis konata kiel "nobla", kaj estis envicigita, ne plu inter kvin, sed inter ses mondajn lingvojn. La kaŭzo de tia decido troviĝas en la "Vortaro de kvin la plej noblaj eŭropaj lingvoj" ("Dictionarium quinque nobilissimarum Europae linguarum") de Faust Vrančić, presita en Venecio 1595, kaj en la latine skribita gramatiko de la kroata lingvo, kiu estis publikigita de Bartul Kašić en Romo en la jaro 1604.

Male al aliaj sudslavaj lingvoj, kiuj ĝis la 19-a jarcento ne havis ian ajn skriban heredajon, la kroata lingvo havis tre fortan lingvan fundamenton kaj aprobon. La kroata lingvo, malgraŭ la fakto, ke kroataj verkistoj kaj lingvistoj uzadis dum jarcentoj la eŭropan internacian lingvon - la latinan - kaj malgraŭ diversaj ŝanceliroj de propraj lingvistoj kaj verkistoj, apogiĝas al la neelĉerpebla fonto de la propra lingvo.

Ni konkludu, ke la kroata lingvo, kiel oni povas legi en fakaj lingvistika tekstoj, diferencas de la aliaj sudslavaj lingvoj en grafio kiu estas la latina (iam ankaŭ glagolico, arabico/bosnia kirila skribo t.n. "bosanĉica"), fonetiko, gramatiko kaj sintakso, ortografio, morfologio (plejparte), semantiko (tre granda diferenco) kaj vortaro. Laŭ la aserto de la akademiano Dalibor Brozović, el 500 mil vortoj, diferencaj kompare kun la pasintece altrudita komuna kroat-serba lingvo estas 150 mil da leksemoj.

ISO 639-1 Code	ISO 639-2 Code	English name of Language	French name of Language	Date added or changed	Category of Change	Notes
hr	hrv	Croatian	croate	2008-06-28	CC	ISO 639-2/B ode deprecated in favor of ISO 639.2/T code



# PASIS KVARONJARCENTO POST LA FORPASO DE FRANJO VOKOUN



*✍ Radenko Milošević*

plej granda parto de maljunaj membroj foriris kaj la pli junaj progresis en la lingvostudado, post la invito de s-ro Vokoun, iuj el ni, inter kiuj estis ankaŭ mi, membriĝis en Esperanto-societo "Bude Borjan".

S-ro Vokoun naskiĝis en Varaždin la 3-an de decembro 1909, en la sama jaro kiam ekfloris nia kroata Esperanto-movado ... Profesie li estis tajloro kaj vivis en diversaj urboj. En 1929 li venis al Zagrebo kie li esperantistiĝis en la jaro 1933 en la Laborista montgrimpa kaj turisma societo "Naturamiko" (kroatlingve: Prijatelj prirode). Unu jaron poste li aliĝis al Laborista Esperanto-Societo kaj ĝis sia forpaso li estis membro de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Kiel membro de la t.n. unuigo "Ekskursado domo" li partoprenis en la konstruado de la montgrimpa domo sur Glavica en la okcidenta montoparto de Medvednica. Post la dua mondmilito li renovigis la societon "Naturamiko" kaj estis unu el la fondintoj de ES "Bude

Borjan" kaj Kroata Esperanto-Ligo, rolante en diversaj periodoj kiel prezidanto de ili ambaŭ. Lia aktiveco en la Esperanto-rondo en la tiama Jugoslavio kaj en la monda movado estis tre grava kaj ampleksa. Ni menciuj nur parton el ĝi: li artikolis por la gazetoj "Voĉo", "Homo kaj kosmo", "La suda stelo", "Jugoslavia esperantisto", "Sennaciulo" kaj "La migranto". Dum la 38-a Universala Kongreso en Zagrebo en 1953 li estis membro de la organiza komitato. Lia agemo estis esprimita ankaŭ en la verkado por nacilingvaj gazetoj. Menciendas, ke li verkis la libron pri la 60-jara agado de la societo "Naturamiko" sub la kroatingva titolo "Prijatelj prirode 1924-1984", eldonita en Zagrebo en 1984. S-ro Franjo Vokoun mortis en Zagrebo la 23-an de septembro 1985.

#### **Fonto:**

- 1) Oficialaj retpaĝo de Kroata montgrimpa asocio
- 2) Pleadin, Josip: *Biografia leksikono de kroataj esperantistoj*, Grafokom, 2002

En la jaro 1961 membriĝis iom granda grupo da gejunuloj el la t.n. "Terena unuo" de Kroata ruĝa kruco en la montgrimpan kaj turisman societon "Naturamiko". Inter ili estis ankaŭ mi. Prezidanto de la societo tiutempe estis s-ro Franjo Vokoun. Li devenis el la rondo de "Laborista Esperanto-Societo" (LES), kaj kune kun la s-roj Josip Vajdlj, Mirko Tandarić kaj aliaj, enkadre de "Naturamiko" li luktis por la lingvo Esperanto. Iom post iom ni, la montgrimpanoj, eniris la Esperanto-sekcion de la societo "Naturamiko" kaj amikiĝis kun Tutmonda Asocio de Naturamikoj - Esperantofako" (TANEF). Kiam malfortiĝis nia montgrimpa societo kaj la



*Montgrimpa domo sur Glavica*

# EN RIFUĜINTEJO LIME DE EŬROPA UNIO

*✍ Christophe Chazarein*

Kiam pasintjare ni anoncis en Esperanto-gazetoj kaj sur ttt-paĝoj la informon pri la helptelefono por esperantistoj, kiuj en Pollando havos problemojn (+48 664 171 168) ni pensis nur pri gastoj de la UK en Bjalistoko.

Sed imagu, ke fine de aprilo 2009 telefonis kaj petis helpon en Esperanto virino el la Centro por Rifuĝintoj en Pollando kiu situas en Czerwony Bor, apud Lomza, proksimume 50 kilometroj oriente de Bjalistoko. Ŝi telefonis nome de 30-persona grupo de kartveloj, kiuj fuĝis el sia lando pro la tiea militostato, kaj forlasinte ĉion alvenis en Pollandon. La posedanto de la telefono, Aleksandro Z. informis Elżbieta (Karczewska!) pri la telefonparolado.

Elżbieta unue sukcesis kontakti la direktoron de ĉiuj polaj rifuĝejoj, kaj poste, danke al lia helpo, la socian laboristinin en la centro de Czerwony Bor, por informiĝi pri la fakta situacio de la rifuĝintoj petantaj helpon. Ŝi povis interparoli kun kartveloj, kaj tiel listigi iliajn bezonojn.

La kolektado komenciĝis. En la klubejon de Bjalistoko oni alportis amason da someraj vestoj (el Kartvelujo ili fuĝis vintre), ŝuoj, ludiloj por infanoj, kuirujoj, sapo kaj ŝampuo. Donis ilin bonvolemaj homoj, esperantistoj kaj ne nur el Bjalistoko sed ankaŭ el aliaj lokoj (interalie Silezio, Varsovio...). La informo disvastiĝis ĉefe per interreto kaj telefono. En kelkaj tagoj, la amasigitaj havaĵoj jam sufiĉis por plenigi kamioneton. La prezidanto de LKK, ankaŭ vicurbestro de Bjalistoko, promesis aranĝi senpagan transporton al la rifuĝejo. Kunveturos du esperantistoj por renkonti la rifuĝintojn kaj transdoni la provizojn. Invitite por akompani, du lokaj ĵurnalistoj priskribos la aferon kaj intervjuos la esperantistan kartvelinon. La 22-an de majo, ekveturis la karavano al Czerwony Bor.

Ekster la loĝdomoj de la rifuĝejo, ni konatiĝis kun Ia, la juna esperantistino kiu privokis nian helpon. Ŝia beleta 3-jara fileto, Brian, staras silente kontraŭ ŝia gambo. Ia donas al ni pliajn klarigojn pri la vivo de la rifuĝintoj. Ili ricevas da po tri manĝoj tage kaj po 70 zlotoj (t.e. proksimume 16 eŭroj) monate. En la rifuĝejo estas kuracejo kaj lernoĉambro por infanoj – kvankam la pli aĝaj jam vizitadas polajn lernejojn ekstere. La plenkreskuloj havas nenion por fari krom atendadi kaj esperi, ke iam oni allasos al ili loĝ- kaj laborrajton en Pollando. La kartveloj freŝe alvenis, sed aliaj jam tri jarojn atendas. Ĉiuj rajtas libere eliri dum la tuta tago, sed



la rifuĝejo situas en arbaro for de la plej proksima urbo, kaj ĉio kostas terure multe por malplenaj poŝoj de rifuĝintoj. Cetere, Ia plendas pri la konduto de kelkaj komercistoj rilate la rifuĝintojn, laŭ ŝi ofte malfavora.

Malfacila situacio ĉiam akriĝas interhomajn konfliktojn, kaj tiuj bedaŭrinde ne malestas inter la rifuĝintoj mem. La plimulto estas el Ĉeĉenujo, kies rilatoj kun la kartveloj estas ofte streĉaj. Laŭ Ia, multaj ĉeĉenoj (islamanoj) timas, ke la kartveloj estos pli favore traktataj ĉe la pola administrejo pro ilia kristaneco.

Invitite de Ia, mi eniris la konstruaĵon, kie vivas grupo de kartveloj. De ekstere ĝi aspektas freŝe farbita kaj renovigita, sed ene oni ricevas tute alian impreson de kadukeco. Vagadas tien kaj reen blatoj. La loĝdomo estas pluretaĝa kaj entenas



# SOMERA KURSO DE ESPERANTO EN KRIŽEVCI

*Krunoslav Puškar*

Ĉi-somere, de la 12-a ĝis 16-a de julio kaj de la 9-a ĝis 13-a aŭgusto, la malgranda urbo Križevci estis vere grandega Esperanto-urbo. Dum du someraj semajnoj ĉirkaŭ 50 ĝiaj civitanoj partoprenis mallongan sed intensan kurson de Esperanto. La kurso mem okazis spontane. Ĉar mi sciigis, ke ne ekzistas esperantistoj en Križevci, mi proponis al la urba biblioteko okazigi kurson. La respondon mi ne atendis longe. La biblioteko montris grandan intereson pri mia propono kaj ebligis okazigi ĝin.

Ĉar la kurso-gvidanto havis multe da devoj, la kurso ne povis daŭri pli ol unu semajno, kio iomete malfaciligis la laboron, sed mi faris mian eblon por instrui al la kursanoj la bazon de Esperanto. Opiniante, ke la kursanoj ne scias multe pri la lingvo, dum la unua tago mi prelegis enkonduke pri diversaj planlingvoj, sed fokusigis al la interesa historio kaj la riĉa kulturo de Esperanto. Aldone, mi komparis la lingvon kun la angla lingvo kaj mi klarigis per multaj ekzemploj (lingvistikaj, interlingvistikaj kaj sociolingvistikaj)

ke la neneŭtrala angla ne povas esti la sola lingvo de Eŭropa Unio. Dum aliaj tagoj okazis la nura kurso, kiu baziĝis plejparte je la konataj lecionoj de la Zagreba Metodo, sed mi prezentis ankaŭ kelkajn Esperantajn proverbojn, Esperanto-muzikon kaj la viklecon de la lingvo mem. Mi estis surprizita pro la intereso, kiun la kursanoj montris koncerne la lingvon. Antaŭ ĉio, la fleksebleco de la internacia lingvo kaj la slava morfologio plaĉegis al miaj kursanoj. Bedaŭrinde, mi povis nur promesi, ke sekvontjare okazos pli longa kurso por komencantoj kaj progresintoj.

La solena disdono de atestiloj okazis la 8-an de septembro en Križevci, kadre de la Internacia Tago de Alfabetismo. La atestilojn disdonis mem la urboestro de Križevci, s-ro Branko Hrg. Sinjoro Josip Pleadin prelegis pri la nekonata historio de la internacia lingvo en Križevci. Ĉe la fino, mi esprimis mian esperon, ke ĉiuj daŭrigos la lernadon de Esperanto kaj ni preparolis eblajn ekskursojn kaj renkontiĝojn en estonteco. Aparte mi dankis al Biblioteko de Križevci pro ilia senĉesa helpo kaj asistado dum ĉi-someraj monatoj. La solenaĵon finis la kursanoj mem kantinte "Bela estas Zagorje la verda" en la nova lingvo.

plurajn loĝejojn kaj kolektivan kuirejon. Sekvante Ian, mi vizitis iun ĉambron pli malgrandan ol ŝia, kie kunvivis 6 kartvelinoj. Kelkaj el la plej banalaj objektoj mankas, kiel ekzemple glasoj. La pordo havas rompitan seruron, kaj ili blokas ĝin apogante lignotabulon kontraŭ ĝin. Al mi ili konfesis sian timon pri nokta vizito de ĉeĉenaj viroj.

Post tiu vizito, ni eliris por aranĝi intervjuon de la fare de la ĵurnalistoj. La ĵurnalistoj demandis en la pola, kaj Ia respondis en Esperanto: tradukis ĉion Nina. Ia rakontas iom pri sia antaŭa vivo: ŝi estis juristino, interalie laboris en Germanujo, kaj kiel esperantistino zorgis pri Esperanto-centro en Kartvelujo. La tiea stato de milito forpelis ŝin kun sia fileto. En la rifuĝejo, ŝi klopodas instrui al siaj samsortanoj Esperanton, sed mankas lernomaterialo. Ŝi esperas, ke ŝi kiel eble plej rapide ricevos pasporton kaj eklaboros en Pollando, ke Brian tie eklernos. La administrejo informis, ke la traktado daŭros verŝajne unu jaron.

Nome de la kartveloj, Ia dankis ĉiujn esperantistojn, kiuj donis al ili aferojn, tiel gravajn

## Kelkaj statistikoj por la jaro 2008

(el Eurostat, 8-a de majo 2009):

- Eŭropa Unio ricevis pli ol 240 000 rifuĝpetojn.
- Ĉirkaŭ 141 000 el tiuj petoj estis rifuzitaj (ĉ. 73%).
- En Pollandon alvenis ĉ. 8 500 rifuĝintoj, kies plejmulto estas el Rusujo (ĉ. 91%).

por homoj en tiel malfacila situacio.

Post tiu interesa renkontiĝo, aperis pollingva intervjuo legebla ĉe <http://www.poranny.pl/apps/pbcs.dll/article?AID=/20090530/MAGAZYN/741438043>

Dank' al la helpo de esperantistoj, la vivado de rifuĝintaj Ia kaj Brian fariĝis pli agrabla. Laŭ la lastaj informoj, post multaj travivaĵoj ili nun vivas en Madrido.

# DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO FONDITA POST MULTAJ KLOPODOJ

 *Dokumenta Esperanto-Centro*

La ideo pri fondo de landa Esperanto-arkivo en Kroatio ne estas nova. En la 1980-aj jaroj ekzistis kelkaj tiaj provoj. La unua, lanĉita de la redakcio de Esperanto-revuo "Voĉo" en Borovo, gvidita de la aktivega s-ano Dušan Adnad, restis nekonata kaj neniam realiĝis, ĉar ĝi planis esti arkivo por la tuta teritorio de la tiama federacia Jugoslavio. Similan entreprenon gvidis dum la ekzisto de Jugoslavia Esperanto-Federacio Marinko Gjiivoje sub la nomo BID (Buroo por informado kaj Dokumentado de JEF), sed efektive temis pri lia propra historiografia laboro. Tiutempe kolektitaj materialoj grandparte konsistigis lian privatan kolekton, kiu poste malaperis (parte kiel malnova papero, parte konservata en Nacia kaj Universitata Biblioteko en Zagrebo, parte vendita en brokantejoj kaj aŭkcioj). Ne malgravas mencii, ke ion similan, je monda nivelo faris ankaŭ nia samlandano Ivo Lapenna, nomante la entreprenon CED (Centro por Esplorado kaj Dokumentado), kiu ankoraŭ funkcias kiel grava arkivo de Esperantujo.


Alia iniciato naskiĝis en Zagrebo, kie la tiama Zagreba Esperanto-Ligo provis realigi la projekton de ZEBIC (Zagreba Esperanto-biblioteko kaj dokumenta centro). Pri tiu temo oni multe diskutis, kaj eĉ KEL faris iajn provoj organizi la kolekton. Tamen, la aferoj montriĝis nesufiĉe maturaj, ĉar la socialisma socio je kies helpo oni

**Supre (apud la titolo). Logoo de DEC.**  
**Malsupre: Parto de la bretaro de DEC**  
**Dekstre: Respondo de Minsiterio pri kulturo de Respubliko Kroatio**



kalkulis, ne donis apogon al ĝi, kaj la esperantistoj deziris havi tuj profesie organizitan zorgon pri siaj dokumentoj. Konfirmiĝis ankaŭ tiam, ke neesperantistaj arkivoj ne deziras transpreni dokumentan materialon en Esperanto.

En tiu tempo komencis kreski ankaŭ la privata kolekto de Josip Pleadin en Durdevac, kiu dum la pasintaj tri jardekoj riĉiĝis per donacoj de maljunaj esperantistoj kaj organizaĵoj, sed ankaŭ per aĉetoj. Kvankam la provoj de la posedanto oficialigi la arkivon estis plurfloje prezentitaj publike, ĉiam aperis problemoj por definitive organizi la landan arkivon, ĉefe kaŭzitaj ĝuste per privateco de la entrepreno. En la UK en Roterdamo 2008, helpe de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), estis lanĉita la ideo pri konstruo de aparta







*Maldekstre: Librobretoj en DEC  
Supre: Sigelo de DEC.*

domo por loki la kolekton. La posedanto tiam komencis monkolektan kampanjon, kaj mem disponigis konstruteron, konstrupermeson kaj konstruplanon por la necesa domo. Sed, la Esperanto-movado montriĝis tro malforta por tia projekto.

Finfine, restis nenia alia solvo, ol provi realigi la ideon en kadroj realigeblaj. Kun grupo da entuziasmaj lokaj samideanoj, la posedanto de la kolekto kunvokis la fondkunvenon de civitana societo havanta la titolon Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), kvankam sub tia nomo jam pli frue funkciis la kolekto havanta ankaŭ la retpaĝaron ĉe ipernity.

La fondkunveno okazis la 13-an de junio 2010, kaj la nova organizaĵo registriĝis en la Registro de societoj de Respubliko Kroatio la 16-an de julio. Grandan konsilan kontribuon rilate la statutajn aferojn kaj kontaktojn kun ŝtataj institucioj donis Velimir Piškorec, partopreninta la fondkunveon.

Pliajn detalojn pri DEC vi povas legi en la (iom malaktuala) teksto "DEC ne estu nur privata kolekto" ĉe [http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com\\_content&task=view&id=24&Itemid=24&limit=1&limitstart=1](http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com_content&task=view&id=24&Itemid=24&limit=1&limitstart=1) kaj vizitante la ipernity-paĝaron <http://www.ipernity.com/doc/>

***dokumenta.esperanto.centro/home/***

Aperis ankaŭ respektiva teksto en "Tempo" kaj la ligilo ĉe la oficialaj retejoj de Kroata Esperanto-Ligo kaj Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj.

Konforme al la preskriboj de sia statuto, DEC sendis al Kroata Esperanto-Ligo la peton ke ĝi akceptiĝu kiel membro-asocio de KEL. Sian favoran decidon KEL faris en la speciala kunsido dum la 8-a kongreso de kroataj esperantistoj en Velika Gorica la 11-an de septembro.

Unu el la plej gravaj dokumentoj tamen estas la respondo de Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio, sendita al Josip Pleadin, per kiu ĝi respondas la leteron senditan al tiu institucio tuj post la fondo de DEC, en junio ĉi-jare. La letero de la Ministerio estas nur konsila, sed tamen ĝi donas esperon, ke protekto de la kolekto kiel speciala arkivo estas ebla. Nun DEC-estraro devas kontakti la Konservistan fakon en Bjelovar por ricevi pliajn instrukciojn.

Cetere, DEC ne okupiĝos ekskluzive per arkivado, sed ĝi funkcios ankaŭ kiel Esperanto-societo kaj informa centro en nordokcidenta Kroatio. Prezidanto de DEC estas Zdravko Seleš, kaj sekretario Josip Pleadin.

**Poŝta adreso de DEC:**  
p.p. 79, HR-48350 Đurđevac  
Kroatio

**Sidejo de DEC:**  
Bana Jelačića 138A,  
HR-48350 Đurđevac.  
Kroatio

Ne dezirante subtaksi la valoron de kiu ajn donacinto al DEC, ni devas konstati, ke la plej grandaj pluroblaj kontribuintoj en 2010 estis:

**1. Reinhard Hauptenthal el Malauĉène (Francio)**, kiu plurfoje donacis al ni gazetojn kaj librojn, ĉefe jarkolektojn de malnovaj periodaĵoj.

**2. Norvega Esperanto-Ligo el Oslo (Norvegio)**, kiu dank' al **Douglas Draper**, du-foje sendis al ni pakajojn kun raraj kaj neposeditaj periodaĵoj.

**3. Jan Nieman el Helsingoer (Danlando)**, kiu jam dufoje donacis al ni amason da tre raraj libroj.

**4. Dragutin Smolić el Paderborn (Germanio)** kiu donacis al DEC multajn celuloidajn filmojn pri UK-oj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj.

# POST KVINJARA PAŪZO KROATAJ ESPERANTISTOJ DENOVE KONGRESIS



*Redakcia kompilo*

*Stanko Rukelj*

Kvin jarojn post la 7-a kongreso de kroataj esperantistoj, kiu estis organizita en Zabok, la enlanda samideanaro denove kongresis. La 8-a kongreso de kroataj esperantistoj okazis la 11-an kaj 12-an de septembro 2010 en Velika Gorica apud Zagrebo. La reveno al tradicia nomo de siaj jaraj kunvenoj estas bona turno en la praktika laboro de Kroata Esperanto-Ligo. Kongresgravajn kunvenojn KEL organizis en 2007 en Rijeka, en 2008 en Zagrebo kaj en 2009 en Osijek, sed ili estis nomataj "jaraj kunvenoj" aŭ konsiderataj specialaj eventoj kiuj signis la jubileojn de la menciitaj urboj.

La 8-a kongreso estis kunlabore organizita de Kroata Esperanto-Ligo kaj la loka organizanto Esperanto-Societo "Mondo Paca" el Velika Gorica. La LKK konsistis el konataj kaj novaj nomoj de esperantistaj aktivuloj: Stjepan Žarina (prezidanto), Spomenka Štimec, Goranka Braim Vlahović, Zlatko Tišljar, Stjepan Muić, Mario

Dilberović kaj Stjepan Kazimir Šipušić. Kvankam relative malgranda (partoprenis nur sesdeko da esperantistoj), la kongreso en Velika Gorica tamen estis bone organizita. Sabaton, la 11-an de septembro estis organizita komuna transporto de kongresanoj per buso el Zagrebo al la Kulturdomo "Galženica", kiu servis kiel nia kongresejo. Je la 9h30 komenciĝis la solena malfermo per kantado de himnoj, muzikprogramo kaj salutparoladoj, interalie de la reprezentanto de Urbo Velika Gorica. En la longa parolado la prezidantino de KEL Judita Rey Hudeček skizis niajn sukcesojn kaj laboron, donante entuziasman tonon al la aranĝo. La tema parto de la kongreso titolita "Esperanto kaj Eŭropo" estis dediĉita al la 60-jariĝo de la ekesto de Eŭropa Unio. Pri la kongresa temo prelegis Vjekoslav Morankić ("Lingvo kiel identeca demando sur novaj teritorioj unuigoj, aparte rilate EU-n"), Zlatko Tišljar ("Problemo kaj krizo de ideo pri lingva egalrajte-

co en EU"), Zlatko Hinšt ("Amikulado inter zagrebaj kaj kroataj esperantistoj - nia plej bona preparo por EU"), Radenko Milošević ("Kroata lingvo antaŭ eniro en Eŭropan Union") kaj Antun Kovač ("Demando de eŭropa komunikado kaj kontaktado de blinduloj").

Estis disdonitaj diplomoj al infanoj partoprenintaj en la konkurso por la plej bona eseo pri la libro "La vivo de Damoru" kadre de Eŭropa Kultura projekto de KEL. Sian kursan atestilon ricevis ankaŭ juna kursano Tomislav Hrebak, la plej bona en la kuso gvidita en Križevci. Al la laŭreato de la Belartaj Konkursoj Josip Pleadin estis transdonitaj la diplomoj alportitaj el Havano, kaj Vida Jerman recitis la premiitajn poemojn "Antaŭ via foriro" kaj "Ekzistas ie kaŝita loko".

Post la diskuto pri la kongresda temo, la kongresanoj komune tagmanĝis en la Hotelo "Garni". Dum la tagmanĝo la Estraro de KEL okazigis sian konstituigan kunsidon, dum

kiu okazis ankaŭ akcepto de Dokumenta Esperanto-Centro el Durdevac kiel membro de KEL.

Post la tagmanĝo la kongresanoj per buso estis transportitaj al Muzeo de Turopolje kie okazis konatiĝo kun la regiona historio kaj folkloro programo, en kiu krom

la kulturarta-societo de Velika Gorica, prezentigis ankaŭ "breakdance"-grupo kaj korea kongresano per tradicia korea danco. La duan kongresan tagon, dimanĉe la 12-an de septembro, okazis aŭtobusa ekskurso tra Turopolje, kiu gvidis al la romia Audaunia, al la vilaĝoj Velika

Mlaka, Lomnica, Mraclin kaj domo de la unua esperantisto en la regiono. La ekskursantoj tagmanĝis en la restoracio "Odranski ribič" en Čička Poljana.

Menciindas, ke la kongreson partoprenis ankaŭ gastoj el Bosnio kaj Hercegovino, Litovio kaj Koreujo.

## TRATEMPA VOJAĜO: KVIN JAROJN REEN AL LA SEPA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

 Radenko Milošević

En la momento kiam oni atendas levigon de la kurteno de la Oka kongreso de kroataj esperantistoj, estas ĝuste momento por rememori kiel pasis la Sepa. Post kvinjara paŭzo, sekvanta la periodon dum kiu ni kongresis sinsekve jaron post jaro (kun la escepto de la jaro de UK en Zagrebo), ni skizu la plej signifajn momentojn de la Sepa kongreso de kroataj esperantistoj okazinta en Zabok en 2005.

La decido de la urbeŝtato de Zabok pri aŭspiciado kaj financa subteno, kaj kunlaboro kun KEL, monapogo de Ministerio pri kulturo kaj monkontribuo de Distrikto Krapina-Zagorje permesis la okazigon de la kongreso sen financa kontribuo de KEL kaj la partoprenintoj mem.

La alta protektanto de la kongreso estis la prezidento de Respubliko Kroatio s-ro Stjepan Mesić kaj je la nomo de la Distrikto Krapina-Zagorje s-ino Vlasta Hubicki, kiu persone partoprenis la kongreson. La Kongreso komenciĝis per kantado de la kroata kaj Esperanta himnoj "Bela nia patrolando" kaj "La espero". La kongreson salutis la urbestro je la nomo de la ŝtatprezidento kaj sia propra nomo kaj siajn salutojn al la kongreso eldiris ankaŭ la



estrino de la Distrikto.

Porokaze estis, krom invitoloj, presitaj ankaŭ du enhavriĉaj dokumentoj. Okaze de la ekspozicio en la Urba biblioteko "Ksaver Šandor Đalski" estis presita la dulingva katalogo titolita "Esperanto en literaturo kaj kultura vivo de Kroatio". En la ekspozicio estis prezentita ducento da beletraj kaj publicistikaj libroj en Esperanto. La ekspozicio kaj la katalogo tiel fariĝis iaspeca historia trarigardo de la Esperanta literaturo en Kroatio, ekde la fondiĝo de Unuiĝo de kroataj esperantistoj

en 1909. La 64-paĝa, dulingva "Kongresa libro", krom la kutimaj enhavoj, entenis la resumojn de sep kongresaj prelegoj.

Kiel kongresejo estis uzita la duoncirkla solena salono de elementa lernejo kaj entute la dutagan kongreson partoprenis preskaŭ cent gastoj kaj kongresanoj, kvankam en la "Kongresa libro" estis registritaj nur 68.

La kongreso okupiĝis pri du kongresaj temoj: "Europa Unio kaj la internacia lingvo Esperanto kiel fundamento de identeco" kaj "Politika penso en Hrvatsko Zagorje - de ilirismo ĝis memstara ŝtato".

Pri la kongreso kaj prikongresaj eventoj tre serioze kaj kun intereso raportis pli ol deko da gazetarj, radiaj kaj televidaj redakcioj. La eventoj de la kongreso komenciĝis per ĵurnalista konferenco, dum kiu al la ĵurnalistoj estis disdonta informmaterialo.

Al la partoprenintoj estis je dispono senpaga aŭtobuso kiu transportis ilin el Zagrebo al la kongresurbo Zabok kaj reen dum ambaŭ kongresaj tagoj.

La kongreso finiĝis per la komuna busekskurso al Gornja Stubica kaj Marija Bistrica, la duan kongrestagon. Per kantado kaj tagmanĝo en Zlatar Bistrica oni adiaŭis la Sepan kongreson.

# UNESKO DEDIĈIS LA JARON 2010 AL KROATAJ HUMANISTOJ

✍ Jozo Marević

Kiel oni povis ekscii, UNESKO dediĉis la jaron 2010 al kroataj humanistoj. Multaj, ne nur inter ni, dirus: finfine! Finfine almenaŭ UNESKO omaĝas grandulojn de la kroata nacio, kiuj multe kontribuis al la okcidenta evoluo scienca kaj kultura. Tiamaniere oni rekonas la rimarkindan kaj signifoplenan rolon de kroatoj (sciencistoj, filozofoj, leksikografoj, filologoj, literaturistoj, verkistoj, poetoj, historiistoj, fizikistoj, kemiistoj, matematikistoj, astronomoj, modelistoj, skulptistoj, muzikistoj...), sen kies kontribuo oni ne povus imagi la hodiaŭan mondan evoluon kaj progreseman avancadon scienc-kaj kulturnivelan, kvankam ĉi tie temas, verdire, nur pri niaj humanistoj, al kiuj UNESKO dediĉis la jaron 2010.

Aliflanke, al ni kroatoj oni devus tamen montri kaj ripeti, kiuj estas tiuj meritaj kroataj granduloj, al kiuj UNESKO decidis dediĉi la atenton.

Ekde la setlado de ĉi tiuj regionoj, kroatoj apartenis al la okcidenta rondo, aparte post kiam ili akceptis la kristanan religion. Sed ili ne nur apartenis, ili fruktodone kontribuis kaj sukcesege kunkonstruis la okcidentajn civilizojn kaj kulturon multflanke. Estas memkompreneble, ke kroatoj plej forte defendis per sia libero ankaŭ la okcidentan civilizon. Kelkaj el la kroataj humanistoj apartenas al la pinto de eŭropa humanisma elito, kaj tiusence ili transigis al la okcidenta Eŭropo ne nur venkojn kaj sukcesojn sur la milita kampo (kroatoj ne estis senkaŭze tiutempe de la eklezio nomitaj *Antemurale christianitatis* - Antaŭmuroj

de kristanismo), sed ili peris al aliaj okcidentaj nacioj artajn kaj sciencajn atingaĵojn, des pli ĉar ili preskaŭ ĉiuj kreis kaj verkis ne nur kroatlingve, sed ankaŭ alilingve, speciale en la latina. Niaj verkistoj en la nordaj kroataj regionoj krom la latino uzis ankaŭ la germanan kaj la hungaran. Aliflanke, la sudregionaj kaj apudmaraj verkistoj skribis plejparte en la itala. Tiutempe nia lingvo estis bariero por perado de informoj, samkiel ĝi estis baro por aktualaj mesaĝoj de niaj verkistoj. Pro tiu fakto ili estis devigitaj verki plejparte latinlingve kaj parte ankaŭ itale, germane aŭ alilingve. Ni menciu ĉi tie nur la plej gravajn el ili!

## BUNIĆ, JAKOV

(*Jacobus Bonus*, Dubrovnik, 1469 - 1500). Religie orientita poeto. Lia mitologia poemo *De raptu Cerberi* - *Pri forrabo de Kerbero* estas la plej malnova poemo en la kroata literaturo.

## CRIJEVIĆ, ILIJA

(*Aelius Lampridius Cervinus*, Dubrovnik, 1463 - 1520). Verkisto de elegioj, epistoloj, odoj, amaj poemoj (*poeta laureatus* - *poeto laŭreato*), konata estas ankaŭ pro sia historia poemo *De Epidaurō* - *Pri Epidaurō*.

## CRIJEVIĆ, LUDOVIK

**TUBERON** (*Ludovicus Cerva Tubero*, Dubrovnik, 1459 - 1527), literaturisto kaj historiisto, reprezentanto de la scienca literaturo. Sekvante *Salustion* kaj *Taciton*, li pitoreske prezentis personojn, okazaĵojn kaj cirkonstancojn en la larĝa spaco de Budimo al Konstantinopolo en la periodo inter la jaroj 1490 kaj 1522. Pro sia akra kritiko de la eklezia politiko en tiu multsignifa verko, ĝi estis baldaŭ envicigita inter la librojn

malpermesitajn (*Index librorum prohibitorum* - *Listo de la libroj malpermesitaj*).

## ĈESMIČKI, IVAN

(*Janus Pannonius*, Ĉesmica, 1434. - Medvedgrad, 1472), kanoniko en Varaždin, episkopo en Pécs kaj slavoniana banuso), tiutempe la plej bona latina poeto. Precipe li verkis elegiojn kaj epigramojn. Kiel elstara tradukisto li tradukis Homeron, Plutarkon kaj Demostenon el la greka en la latinan lingvon. Generale, li skribis latine. Li ankaŭ postulis de la papo la urĝan helpon kontraŭ turkoj.

## ĈIPIKO, KORIOLAN

(*Coriolanus Cepio*, Trogir, 1425-1493). Li skribis memuarojn marajn titolitajn *Petri Mocenici imperatoris gestorum libri tres* - *Tri libroj pri agoj de la estro Petro Mocenigo*.

## DOMINIS, MARKO

**ANTONIO DE** (*Markantun de Dominis*, Rab, 1560 - Romo, 1624), episkopo en Senj (1579-1596), ĉefepiskopo en Split (1602; oni atendis en Split ducent jarojn kroaton por okupi la ĉefepiskopan seĝon, ĉar ĉiuj ĉefepiskopoj intertempe estis italoj). Li prelegis retorikon, logikon kaj filozofion, matematikon kaj natursciencon en Brescia kaj en Padova. Kialojn de ĉiuj liaj problemoj kaj malfacilaĵoj oni trovas en lia principo. Nome, en la konflikto inter la papo kaj Venecio en la jaro 1606 li inklinis al Venecia ŝtato. De Dominis pledis kaj tute defendis sian teorion sintenon, konsiderante, ke la papa aŭtoritato ne povas esti super la leĝo. Tie kuŝas lia interesiĝo pri demandoj en la rilatoj inter eklezio kaj ŝtato. Siajn unuajn pripensojn, kaŭzitajn de tia situacio, por li ege maloportuna,



li publikigis en sia verko, eldonita en Heidelberg *Scogli del Cristiano naufragio - Rifoj de la kristiana ŝiprompiĝo*. La titolo tutcerte kaj sendube indikas la enhavon de la verko. Post kiam li apostatigis de Romo, li alvenis en la jaro 1616 (la jaro de la morto de Ŝekspiro) al Britio, kun kies ambasadoro en Venecio jam delonge li korespondis. En Londono li ĝuis ĉiujn privilegiojn. Li estis instalita sur la kvinan lokon apud la reĝo James. Li prelegis en la universitato de Kambrigo kaj Oksfordo. En Kambrigo kiel la unua inter kroatoj li estis promociita al doktoro de teologio, kvankam jam antaŭe, en la jaro 1600, li ricevis la saman titolon en la universitato de Padova. Samtempe li publikis sian ĉefverkon *De republica ecclesiastica - Pri la ŝtato eklezia*. En tiu verko li pledis, kontraŭstarante al papo, por kompeta reorganiziĝo de la katolika eklezio. De Dominis estas ankaŭ konata en la kampo de fiziko kaj optiko. Li vekis grandan intereson per sia verko *Tractatus de radiis visus et lucis in vitris, perspectivis et iride - Pri radioj de vido kaj lumo en lensoj kaj en ĉielarko* (kie li pritraktis la teoriojn pri la lensoj, teleskopo kaj pri la ĉielarko). Tial Newton rememoras pri li, mencias kaj kelkfoje eĉ citas lin en sia verko *Euripus seu de fluxu et refluxu maris sententia - Eŭripo aŭ diskutoj pri mara fluso kaj malfluso* (en tiu verko li asertas, ke la suno kaj la luno decide influas la fluson kaj malfluson, anticipe indikante tiamaniere la teorion de la gravito). Interese estas, ke De Dominis enkondukis en la lingvon la vorton *puritano* en la moderna, nuntempa signifo. Liaj verkoj estis konataj tra la tuta Eŭropo kaj ili jam liatempe estis tradukitaj en la anglan, germanan, latinan (se tiuj ne estis origine latinlingvaj), polan, francan ... De Dominis okupas rimarkindan kaj altnivelan lokon en jarcentaj diskutoj pri unueco de la eklezio. Li estis, unuvorte, grava kaj influa membro de la

sciencia internacia komuno de la 17-a jarcento. Okaze de lia 450-a naskiĝdatreveno, atendata estas eldonado de liaj kolektitaj verkoj.

#### DRAGIŠIĆ, JURAJ

(*Georgius Benignus de Salviatis*, Srebrenica, 1445. - Barletta, 1520), kroata filozofo kaj teologo, unuaranga konanto de la lingvoj greka, latina kaj hebrea. El Bosnio li fuĝis al Dubrovnik kaj poste edukigis en Italio, Francio kaj en Anglio ĉe la universitato de Oksfordo. Lia ĉefverko estas *Opus de natura coelestium spirituum - Verko pri naturo de la ĉielaj spiritoj*. Dragiŝić korespondis kun multaj konataj humanistoj kaj sciencistoj de sia tempo. Konata estas lia korespondado kun Erasmo de Roterdamo (*Erasmus Desiderius*).

#### KOŽIČIĆ, ŠIMUN

**BENJA** (*Simon Begnius, Begna*, Zadar, 1460 - 1536), verkisto, oratoro kaj episkopo en Modruš. Dum la Luteranaj koncilioj de 1513 kaj 1516 li parolis pri malbonega situacio en Kroatio (*De Croatiae desolatione - Dezertigita Kroatio*) postulante militon kontraŭ turkoj. Kožičić fondis glagolican presejon en Rijeka en la jaro 1530.

#### MARULIĆ, MARKO

(en okcidenta mondo konata kiel *Marulus* aŭ *Marula*, Split 1450 - Split, 1524), granda kroata verkisto, en la latinaj verkoj subskribiĝis kiel *Marcus Marulus Spalatensis* kaj *Marcus Marulus Delmata* kaj en la kroatlingvaj verkoj *Marko Pečenić*. Li estis fondinto de la kroata literaturo, kaj pro tio oni nomas lin patro de nia literaturo. Marulić estis la unua sciencisto en la mondo, kiu uzis la nocion *psikologio*, kian oni nuntempe uzas en la sciencia mondo. Lia verkaro estas trilingva, ĉar li skribis latine, kroate kaj itale. La plej gravaj latinaj verkoj: *De institutione bene beateque vivendi - Rekomendoj por bona kaj feliĉa vivo* kaj *Davidias - Davidiado* (unu el la plej gravaj bibliaj eposoj de la eŭropa humanismo). La plej rimarkindaj verkoj en la kroata lingvo estas la eposo *Judita - Judito* (alegoria

kaj historia poemo) kaj *Molitva suprotiva Turkom - Preĝo kontraŭ turkoj*, en kiu li atentigas la okcidentan mondon, unuavice la papon, pri la grandega danĝero flanke de turkoj. La verkoj de Marko Marulić estis jam delonge tradukitaj en kelkajn okcidentajn lingvojn. Ne miras tial, ke eĉ reĝoj, ekzemple la anglaj, legis ties verkojn.

#### PETRIĆ, FRANE

(ankaŭ *Petris, Petriš, Petrišević* *Franjo*, latine *Franciscus Patricius*, itale *Francesco Patrizzi*, Cres, 1528 - Romo, 1597), filozofo kaj politika historiisto. Li okupiĝis pri filozofio, studis ankaŭ medicinon, kaj estis eldonisto. Ĉefaj verkoj: *Sretni grad - Civitas felix - Feliĉa urbo, Discussiones peripateticæ (I-IV) - Peripatetikaj diskutoj, Nova de universis philosophia - Nova filozofio pri la universalo, O pjesničkom umijeću - Pri poeta scipovo*. Temo de lia studado estis filozofio de la naturo kaj li ekinteresis per siaj verkoj grandajn eŭropajn filozofojn (Hobbes, Descartes, Newton, Gassendi ...). Itallingve li verkis pri poetiko, retoriko (*Della rettorica - Pri la retoriko*), historio (*Della storia dieci dialoghi - Dek dialogoj pri la historio*), filozofio, matematiko, geometrio (*Della nuova geometria - Pri la nova geometrio*), geofiziko, medicino kaj pri la militistaj demandoj (*Paralleli militari - Paraleloj militistaj*).

#### PRIBOJEVIĆ, VINKO

(*Vicentius Priboevius*, naskiĝis en la 16-a jarcento en la insulo Hvar), dominikano, profesoro de teologio. Li famiĝis per sia prelego *De origine successibusque Slavorum - Pri deveno kaj eventoj ĉe slavoj*. Temas pri gloriga panegiriko en kiu Pribojević laŭdegas la faman pasintecon de slavo. Tio estas la unua panslavisma ideo en la kroata literaturo.

#### ŠIŽGORIĆ, JURAJ

(*Georgius Sisgoreus*, Šibenik, 1420 - Šibenik, 1509). Latinista poeto. Lia latinlingva kolekto *Elegiarum et carminum libri tres - Tri libroj de elegioj kaj poemoj*,

estas nia unua inkunablo. En siaj elegioj *De duorum obitu fratrum - Pri morto de du fratroj* kaj *De Sibenicensis agri vastatione - Pri dezertigado de la ŝibenika kampo* li forte esprimas sian doloron kaj suferojn de la popolo, kaŭzitajn de turkoj. La poeto mem poezias: *Pro te, sacra fides, et dulcis patria, pro te / sit mea barbaricis dedita vita viris - Sankta religio, por vi kaj dolĉa patrolando, por vi / vivon mian mi donus al tiuj barbaraj viroj*. En ĉi tiuj vortoj estas kaŝita la pli poste disfamiĝinta kaj inter kroatoj ege konata devizo: *Pro aris et focis - Por la religio kaj por nia hejmo*. En sia manuskripto *De situ Illyriae et civitate Sibenici - Pri situo de Ilirio kaj de urbo Ŝibenik*, kvankam li kutime skribis latinlingve, li glorigas poemojn, proverbojn kaj lingvon de la popolaj lingvaĵoj kaj literaturo.

## TRANKVIL, FRAN

**ANDREIS** (*Andronicus Tranquillus Parthenius*, Trogir, 1490 - 1571). Li studis kaj poste aktivis tra la tuta Eŭropo. En sia verko *Oratio - Preĝo* (samtempe en versoj kaj paroladoj) li atentigas germanojn kaj aliajn eŭropanojn pri la grandega danĝero de turkoj, aparte post la malbonfama batalo ĉe Mohács.

## VLACIĆ MATIJA

**ILIRIK** (*Matthias Flacius Illyricus*, Labin, 1520 - Frankfurto sur Majno, 1575), unu el la fundamentaj kolonoj de la protestantismo, de la reformacio (Lutero nomas lin homo de la granda kredo kaj li estas la plej konata inter la niaj). Krom latine, li verkas ankaŭ itale, kroate, germane kaj hebree. Longe li estis profesoro de filozofio kaj de la hebrea lingvo, kaj samtempe de teologio ĉe la universitatoj en Wittenberg, Magdeburgo Antwerpeno, Aŭgsburgo kaj Jena. Kiel "fremdulo kaj slavo" (en Germanio) la tutan vivon li batalis kontraŭ Romo ("Ahilo de la tuta protestantismo") kaj persiste kontraŭstaris al tiuj, kiuj pretis kompromisi kun la

oficiala teologio de la roma papo. Li skribis preskaŭ cent verkojn, el kiuj la ĉefaj estas: *Catalogus testium veritatis - Katalogo de atestantoj pri la vero*, *Ecclesiastica historia - Historio de la eklezio*, *Clavis scripturae sacrae - Ŝlosilo de la sankta biblio*, *Lexicon encyclopaedicum hebraeismorum - Enciklopedio vortaro de hebreaismo* (kiu fariĝis la fundamenta verko de la protestanta interpretado de Sankta Biblio) ... Estas tre konata lia historia principo *Historia est fundamentum doctrinae - Historio estas fundamento de la scienco*.

## VRANČIĆ, ANTUN

(*Antonius Verantius, Vrantius* aŭ *Wrantius, Ŝibenik*, 1504 - Prešov, 1573). Poeto, arkeologo, vojaĝpriskribisto, libera pensulo, diplomato kun diplomaciaj misioj en Aŭstrio, Francio, Italio, Anglio, Venecio, Turkio kaj Pollando, episkopo en Pécs kaj fine kardinalo. Li studis en Vieno, Padovo kaj Krakovo. Lia kolekto latinlingva *Otia - Poemoj en tempoabundo*, eldonita en Krakovo en la jaro 1542, estas elegioj pri amo, pri vivo ... Li korespondis kun pli elstaraj personoj de sia epoko: Erasmo, Melanchtono, Nikolo Zrinski, Trankvilo Andreis k. t. p.

## VRANČIĆ, FAUST

(*Faustus Verantius, Ŝibenik*, 1551 - Venecio, 1617), politika historiisto, inventisto, konstruisto, leksikografo, episkopo de Csanád. Kiel multflanka kaj originala scienca spirito en sia verko *Machinae novae - Maŝinoj novaj* li anticipis multajn teknikajn inventojn en estonteco. Tamen lia ĉefverko estas leksikografia: *Dictionarium quinque nobilissimarum Europae linguarum - Vortaro de kvin plej noblaj lingvaj eŭropaj* (1595). Temas pri nia unua vortaro, kiu en la tuta Eŭropo estis altnivele kaj bonege recenzita. Li famiĝis ankaŭ en la kampo de filozofio per la verkoj *Logica nova - Nova logiko* kaj *Ethica christiana - Kristana etiko*.

# HOMA FIERO

*Malgosia Komarnicka*

Estis nuba tago. Pluvetis. Ŝajnis, ke ĉio ĉirkaŭe krias pri malfeliĉo. Pri malfeliĉo, kiun oni povis eviti!

Jan staris kurbigiĝinta, klinita antaŭ la tombo, kvazaŭ ne kredante, ke tio vere okazas. Li deziris, ke la lastaj jaroj malaperu el lia vivo, samkiel malaperas malbona sonĝo post vekigo. Ho, kion li donus por revenigi la tempon pasintan ...!

Li aspektis kiel persono ne scianta kio okazas ĉirkaŭ li. Li ŝtoniĝis. Neniel li povis movi iu ajn parton de sia korpo. Li ne povis eĉ plori, ploregi, krii ... Subite li sentis faciligon kaj silente falis sur la freŝe formitan tombon. Li flustris "pardonu", kaj haltis senmove.

Paweł estis la longe atendata kaj amata infano de Jan. Lia edzino mortis kelkajn tagojn post la nasko de la filo. Jan luktis kontraŭ multaj malfacilaĵoj, edukante la solinfanon, kaj iom post iom rifuzante la helpon flanke de la familioj, samtempe de la propra kaj de la edzina.

Paweł tre malsanis, do la patro devis akcepti ĉiaspecan kromlaboron, por pagi lian kuracadon.

Pro tio, Jan pasigis apud la lito de sia filo nur vesperojn, mankaresante la dorman kapon de la infano.

Paweł estis ĝentila infano, lin neniu devis klopodigi. Tamen, Jan havis preskaŭ neniujn postulojn rilate lin. Preskaŭ dum la tuta vivo ili preterpasis unu la alian. Kiam Jan eliris por labori, Paweł ankoraŭ estis en la lito, kaj kiam li revenis, la filo jam dormis. Pli ofte ili skribis unu al la alia, ol interparolis. Jan lasus skribitan



folion pri tio kion faru Paweł, kaj Paweł de tempo al tempo lasis informon pri lerneja kunveno, klasekskurso aŭ bezonataj aĵoj.

Pasis jaroj, kaj iliaj reciprokaj rilatoj senĉese estis la samaj. Ili plu fremdiĝis unu al alia.

Jan tre amis la filon, sed li ne scipovis tion montri al li. Li ne havis tempon por ludi kun li, legi fabelojn, promeni aŭ interparoli. Ĉiu ilia komuna interparolo finiĝis tre rapide.

Plej ofte, do, ili silentis.

Jan eĉ libertempon pasigis laborante. Li revis pasigi kelkajn tagojn kune kun la filo ĉemare. Iom veturi per boato, promeni sur la varma sablo, naĝi en la maro aŭ manĝi fiŝon kun frititaj terpomoj ... Jan konstante memoris sian lernejan ekskurson al la maro kaj la feliĉon, kiun tiam li travivis. Li deziris dividi sian feliĉon kun la filo.

Jaroj tamen pasis tiel rapide, ke Jan ne rimarkis kiel Paweł plenkreskiĝis. Li ne povis kompreni kial li ne scipovas interkompreniĝi kun filo. Kial ili tiel ofte kverelas? Kial lia filo plej ofte restadas ekster la hejmo?

Kiam Jan fariĝis pensiulo, li havis multe da tempo, kiun li volis dediĉi al la filo. Sed ju pli li provis interparoli kun Paweł des pli inter ili estis kvereloj. Jan ne scipovis proksimiĝi al la filo, kaj Paweł ne faciligis tion.

Dum la lastaj komunaj jaroj okazadis konstantaj kvereloj.

Paweł decidis foriri kun kolegoj labori eksterlande. Li petis helpon de sia patro, petante pruntedoni iom de mono por forveturo, sed Jan rifuzis. Li opinis, ke la filo nenien devas forveturi. Ili interkverelis.

Ofte sidante ĉe la kuireja tablo Jan revenadis al tiu momento. Liaj vortoj, kiel akra sonorilo trapikadis lian koron. "Nienien vi iros! Ĉi tie estas via loko ... Mi regas ĉi tie! ... Mi ne permesos ke vi disipu vian vivon ... Se vi eliros, vi neniam rajtos reveni ĉi tien!"

Jan estis edukita en

granda amo al sia patrujo, al tero sur kiu li naskiĝis. Li ne scipovis kompreni, eĉ li ne provis, ke la tempo ŝanĝiĝis, ke loĝante eksterlande oni ankaŭ povas esti patrioto.

Li malbone dormis dum tiu nokto, li turniĝis jen al unu jen al alia flanko ... Strangan songon li havis. Li songis la edzinon vokanta: "Interparolu kun Paweł." ... Matene li ellitiĝis ege laca. Li provis analizi la pasinttagan incidenton, sed li ne povis koncentriĝi.

Ĉar Paweł longe ne ellitiĝis, li enrigardis al lia ĉambro. Sur la tablo kuŝis paperfolio kun la teksto: "Mi forveturas. Mi sendos vivsignon kiam mi ordigos mian vivon. Pardonu! Paweł."



Malfacile estas priskribi tion, kion li travivis en tiu momento. Li estis furioza! Dum du semajnoj li iradis kiel freneza. Li kredis, ke Paweł tuj post momento revenos. Li eĉ manĝaĵon preparadis, kiel kutime, por du personoj. Kun espero li rigardadis la preterirantan leterportiston surstrate. Lia koro ĉiufoje pli forte batis. Bedaŭrinde, ne venis la longe atendanta mesaĝo.

Tamen, post unu monato, iuvespere eksonoris la

telefono. Aŭdinte ĝian sonon, la koro de Jan ekvibris, kaj kiam li ekaŭdis la voĉon de Paweł, io sufoke premis lian gorĝon.

Paweł estis feliĉa. Li rakontis pri sia laboro, pri la unua salajro, pri la sendita pakajo kaj pri invito.

Kial li ne scipovis kungoĝi kun li? Kial subite li komencis flegi rankoron? Kial subite antaŭ liaj okuloj aperis la lasta komuna vespero, kaj kial li klare aŭdis la tiam eldiritajn vortojn: "Se vi eliros, vi neniam rajtos reveni ĉi tien!?" Kial dum la telefona interparolado li nenion diris? Kial li demetis la aŭskultilon? Li neniam scipovis respondi tiujn demandojn.

La soleco estis kruela. Li tiel ege volis, ke la filo vizitu lin, sed li nenion faris por ŝanĝi la situacion. Li konis ja la adreson de la filo. Paweł regule, unufoje en la monato, sendis al la patro pakajojn, kaj ankaŭ poŝtkartojn okaze de festoj, naskiĝdato kaj nomfestoj. Li provis ankoraŭ kelkfoje telefoni, sed Jan, nenion dirante, ĉiufoje demetis la aŭskultilon ...

Pasadis tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj. Jan preskaŭ ne eliradis el la hejmo, profundigite en sia desappointiĝo kaj soleco.

Ĉiutage li tamen observis la leterportiston kaj atendis la telefonan interparoladon. Ĉiutage li ankaŭ preparadis du manĝojn ...

Subite ŝanĝiĝis ĉio. Iuvespere alvenis mesaĝo kaj ĝi frapis Jan-on precize en la koron. Li memoris nur ĝiajn fragmenterojn ... Malbona vetero ... Akcidento ... Ebria ŝoforo ... Identigo de kadavro ... Li ne memoras kio okazis plu. Ĉirkaŭ li amasiĝis la proksimuloj, kun kiuj, pro la propra kulpo, dum jaroj li havis nenian kontakton. Dank' al ili estis pli facile al li trapasi la terurigajn momentojn, kiuj subite ekregis lian vivon. Li komprenis, ke la vivo estas tro mallonga, por flegi rankoron.

